

# JOSEF EN DOTAN

BIBLIA DRAMO

DE

JOOST VAN DEN VONDEL

EL NEDERLANDA LINGVO TRADUKITA KAJ ELDONITA PERE  
DE LA KATOLIKA ESPERANTISTA KLUBO  
„SUDA KRUCO”  
EN EINDHOVEN (NEDERLANDO)



Mendebla ĉe: „SUDA KRUCO” EINDHOVEN  
POŝTKONTO 267472



*Koran dankon pro via fidele  
helpo de 1900 E3!*

*Amike via, Jacques*

# JOSEF EN DOTAN

BIBLIA DRAMO

DE

JOOST VAN DEN VONDEL

EL NEDERLANDA LINGVO TRADUKITA KAJ ELDONITA PERE  
DE LA KATOLIKA ESPERANTISTA KLUBO  
„SUDA KRUCO”




PREZO f 0.75

Mendebla ĉe : „Suda Kruco”, Eindhoven. Poŝtkonto : 267472

546964





Bk-2

821.112.5-2

Al Lia Ekscelenca Moŝto

Monsinjoro Doktoro ANTONIO ELTSCHKNER,

titol-episkopo de Zephirio,

help-episkopo de Praha,

dediĉas plenrespekte ĉi tiun verkon

la katolika Esperantista klubo

en Eindhoven (Nederlando)

„SUDA KRUCO”.

## AL LA LEGANTO.

Nederlando festas ĉi-jare la 350-an datrevenon de la naskiĝo de Vondel, sia plej granda poeto.

En Nederlando (Den Haag) okazos ĉi-jare la deknaŭa kongreso de la katolikaj Esperantistoj.

La koincido de ambaŭ faktoj kaŭzis la aperon de ĉi tiu libreto.

Prave la kongres-komitato de „Nia Deknaŭa” opiniis dece, ke ni honoru la memoron de Vondel per la dumkongresa prezentado de unu el liaj teatraĵoj.

Ĝis nun la Esperanto-literaturo enhavis nur unu el liaj verkoj, nome: „Gysbreght van Aemstel”, tradukita de Sro Inĝ. Isbrücker.

Ĉi tiu verko havas pli lokan signifon, pritraktante epizodon el la historio de Amsterdam.

Pro tio ĝia enhavo ne tiom povas interesi la internacian Esperantistaron, kiom unu el la bibliaj dramoj, kiujn Vondel verkis.

El ĉi tiuj certe la plej konata kaj ŝatata de la Nederlanda popolo estas „Josef en Dotan”.

Tiun do la kongres-komitato elektis, kaj ĝi komisiis al la Eindhoven'a klubo „Suda Kruco” la prizorgon de ĝia traduko kaj prezentado.

Nia klubo tuj akceptis tiun honoran taskon, kaj jen ĝi prezentas al la Esperantistaro la Esperantan tekston kun kelkaj klarigaj notoj, kiuj plifaciligos la komprenon de la teksto, kaj pli profunde ĝuigos la belecon de la sublimaj ideoj, kiujn Vondel en ĝi esprimis.

Ni ĝojas, ke tiel ankaŭ ni povas doni pruvon de nia admiro por la genio de Vondel, kaj samtempe povas servi la Esperanto-movadon.

„SUDA KRUCO”.

Eindhoven (Nederlando), Majo 1937.



## PERSONOJ.

JOSEF.

RUBEN.

SIMEON.

LEVI.

JUDAS.

KARAVANESTRO.

ALIAJ FRATOJ.

SERVISTOJ.

ĤORO DE ANĜELOJ.

La dramo komenciĝas matene kaj finiĝas posttagmeze.

# JOSEF EN DOTAN.

## UNUA AKTO.

### ĤORO DE ANĜELOJ.

Jen Josef, fil' de Raĥel, de Jakob subten',  
En erikej' dormanta dolĉe ĝis maten'  
Ĉe puto flanke de al Dotan la grandvojo,  
Laŭ kiu kuŝas la paŝtej', kie kun ĝojo  
En kor' li serĉas siajn fratojn. Dume ni  
Atente gardas lin, laŭ altordon' de Di',  
De kiam li dum nokt', pro longa voj' lacega,  
Kuŝiĝis en eben' soleca kaj vastega,  
Kvazaŭ al Dio kaj fidela Anĝelar'  
Li fide rekomendis sub la brilstelar'  
La gardon, ne timante pro danĝer' de bestoj  
Muĝantaj pro malsat', soif', kaj la tempestoj.  
Ho vi, ĉielinfano, de l'Anĝeloj ĝoj',  
Trankvile dormu vi, kaj poste sur la voj'  
La paŝojn notos ni, la vojon ebenigos  
Kiu tra rokoj kaj dornaĵoj vin venigos  
Al reĝa glor', kiu atendas vin pro am'  
De Di' al la idar' de praav' Abraham,  
Kies espero forĝas ĉenon ĝisglorfinan  
Da idoj, laŭ promes' orakla, la subliman  
Perilon kies formas vi, ho nobla id',  
Metante fundamenton de la piramid'  
Generacia, kiu, simpla en komenco,  
En supro ĝis la steloj brilos pro potenco,  
Kaj ĉe la bazo etendiĝos de l'aper'  
Ĝis la subir' de l'sun', kaj estros sur infer'.  
Pro tio : se la dormo via maldolĉiĝis  
Per sonĝ' terura, nun la timo jam foriĝis.  
Vidu, vekiĝas li, kaj gaje kun la lum'  
Li levas la vizaĝon sian junan, dum  
La suno supreniras. Nun li surpiediĝas.  
Ni aŭdu lin saluti Dion, dum tagiĝas.



## JOSEF.

La sun' disiĝas de la horizont' en glor'  
 Alkondukante tagon, kiu pelas for  
 Songbildojn, kaj prezentas florojn rosbrilantajn,  
 Kaj la montpintojn de Dotan, nun aperantajn,  
 Sur kies montetar' kreskadas en prosper'  
 La trifoli', oliv', figarboj kaj vinber',  
 Kaj akvo ĉiuloke nutras la herbejojn.  
 Malfermas frumatene paŝtistar' bestejojn,  
 Kaj iras al paŝtej'. Ŝajnas, ke aŭdas mi  
 La gregon de l'fratar'. Jam proksimiĝas ĝi.  
 Jen kiel tiuj sonoj hejmaj el la koro  
 Forviŝas la songpremojn de la nokta horo.  
 Malmulte ja signifas tia fantomaj'!  
 Kredante ĝin, mi montrus mankon de kuraĝ'.  
 Mi pensis, min ĉirkaŭas naŭo da serpentoj,  
 Volante kapti min pro malafablaj sentoj.  
 Antaŭe ili sin skurĝadis en manier'  
 De vip', per sia vost' batante en koler'  
 Kreskanta ĝis frenez', flamanta el okuloj  
 Iliaj, kvazaŭ flam' ŝprucanta el karbbuloj  
 Ardaj en du fenestroj, pelis galon en  
 La buŝon, kaj aperis blua la venen'  
 Sur pinta lango, tremadante celserĉanta,  
 Kaj sangon mian senpacience soifanta.  
 Timiga ja aspekt'! La de l'okuloj bril'  
 Traboris la mallumon, kaj mi vidis mil  
 Lumetojn sur la skvamoplenaj dorsoj brili  
 En blua or' nebula. Korpojn volvis ili  
 En bukloj sen ripoz'. Siblodon aŭdis mi  
 El flavaj la buŝaĉoj. Jen! Ĉu fantazi'?  
 Spirito de l'patrin', la harojn, dum mi revis,  
 Fuŝante per la man', gratante bruston, levis  
 La kapon, vekis min per krio en aer':  
 „Ho fil', forkuru tuj! Minacas vin danĝer'!”  
 Ektime mi ekstaris, mire ĉirkaŭvidis.  
 Nur aŭdis tri ĝemegojn, — tamen mi ne fidis, —  
 El jena puto, kaj denove min sur ter'  
 Kuŝigis, kaj mi aŭdis flustron tra l'aer':  
 „Kuraĝon, karjunul'! Di' benos vojon vian!”

Mi do daŭrigos nun en Di' vojaĝon mian'  
 Kaj serĉos fratojn, kaj salutos kun humil'  
 En patra nom', laŭ devo de plej juna fil'.  
 Sincera korsalut' kapablas ja kuraci  
 Malpacon inter fratoj, kaj denove paci  
 La korojn al la interfrata amikec'.  
 Kaj, se mi eble mem misfaris pro maldec',  
 Kaj tio rezultigis la malbonon nunan,  
 Tia agad' sendube decas la plejjunan.  
 La patro iam same kontraŭ la envi'  
 Agis de sia frat'; ekzemplo ja por ni.  
 Sed ne komparu mi la bonfrataron mian  
 Kun onklo, deviginta fuĝi fraton sian  
 Al onklo Laban, kie li, kiel paŝtist'  
 Dum longa tempo loĝis kiel nur servist'.  
 Se mankus afablec' al lipoj tro banalaj  
 La miaj, Di', kiun gorĝetoj najtingalaj  
 En ĥoro laŭdas per kantad', al mia buŝ'  
 Donacu elokventan sonon per la duŝ'  
 De paradiza ros', por bone paroladi  
 Plej dolĉe, por ke paco povu reestadi.  
 Anĝel', gvidinta patron al gepatra dom',  
 Al urbo Dotan gvidu min en Dia nom'!

## ANĜELARO.

## KANTO.

Ho, font' eterna de zorgemo!  
 Kiom profunde la ekstremo  
 Via kaŝiĝas por esplor'  
 De homoj, ankaŭ de Anĝeloj,  
 Antaŭ ol ili el ĉielo  
 Sin miksas en homara ĥor'!  
 La Plejsupremo sur la trono  
 Aranĝas ĉion per ordono,  
 Kio okazos en estont'.  
 Per sonĝoj Li malkaŝas iam  
 Estonton, por ke brilu tiam  
 Pli klare Lia glor' en mond'.  
 Semu malam' maldekstramane;  
 La Dia man' ne falĉas vane.



Ne ĝin komprenas homprudent',  
Ke ni al Dotan nun vojaĝas,  
Kaj for de Memfis Josef paŝas,  
Tiel iĝante l'Eminent'.

## RESPONDKANTO.

Jes, Patro, Vi sentigu l'homojn,  
Ke Vi uzadas la malbonojn  
Por la bonfart' de la homar':  
El dornoj prenas Vi violojn,  
Kaj same ŝanĝas Vi la rolojn  
Favore al la virtular'.  
La virtoj kaj malvirtoj klare  
Distingas sin interkompare:  
Montriĝas ĉies propra spec'.  
Ravas per bril' facetaj ŝtonoj;  
Krudŝtonoj decas ne sur kronoj:  
Per polurad' venas brilec'.  
Kaj brilo plaĉas al okulo;  
Ĝin ŝatas eĉ la nespertulo.  
Tiel do Josef, laŭ valor'  
Montrante sin boneganima  
Junul', sin montros plej sublima  
Post persekuto kaj dolor'.

## PLUKANTO.

For de la kargepatra domo  
Ricevos li, malforta homo,  
La pezan ŝarĝon de servul',  
Por poste regon partopreni,  
La reĝan taskon eĉ subteni  
Kiel amata superul',  
Grenon abundan rikoltante,  
Pri malsateg' antaŭzorgante.

## DUA AKTO.

SIMEON, LEVI, JUDAS.

## SIMEON.

Tre ĝustatempe por laŭŝate nutri gregon  
Ni venis de Siĥem en jenan abundegon  
De la freŝega herb', ridanta al brutar',  
Kiu ĝis ventro staras en trifoliar'.  
Sed, fratoj, jen, rigardu! Kiu jen rapidas  
Al urbo? Mi la kapon, nun la bruston vidas,  
Nun la genuojn, krurojn. Jen sur monto li.

## LEVI.

Mi vidas, Simeon. Sed min demandas mi:  
Kiu li povas esti?

## JUDAS.

Per facilsaltado  
Antaŭeniras li. Ĉu estas vir', aŭ knabo?

## LEVI.

Laŭ la saltado oni dirus, Judas, ke  
Li estas knabo. Kaj min ŝajnas, ke li ne  
Iras laŭ fiksa cel', sed estas nur vaganta.

## JUDAS.

Se bone vidas mi, jen frato nin serĉanta.

## LEVI.

Ĉu eble la revul', kiu vizitos nin?

## SIMEON.

Laŭŝajne jes!

## LEVI.

Ho pesto! Morto frapu lin!  
Jes, venas la revul'! Por kio li ĉi tie?

## SIMEON.

Supozas mi, ke volas li observi, kie  
Ni estas, kion faras ni pri la brutar'.



## LEVI.

Por ja denunci nin ! Frakasu lin bestar' !  
La tondro frapu tiun kapon revadantan !

## SIMEON.

Ne koleriĝu vi : ni havas nun frapantan  
Bonŝancon por ja taŭge rekompenci lin !  
Sidiĝu iom ! Urben li direktas sin,  
Do havas ni sufiĉan tempon por diskuti,  
Kiel, venĝante nin, ni povas lin saluti.

## JUDAS.

Sed antaŭ venĝo vi pripensu pri justec'.

## SIMEON.

Nur kiu scias, ŝuldas pri la respondec' :  
Pro tio estus pli facile, ĉion nei.

## JUDAS.

Pripensi ja preferu vi, ol poste vei.  
Antaŭe konsiliĝu ĉiu komplotan' :  
Kion misfari li, aŭ krimis la infan' ?

## SIMEON.

Ĉu kion li misfari ? Hontu tion diri !  
Li kiom ofte nin denunci, por akiri  
Danketon de la patro, esti karafil' !  
Kaj kiom da malpac' pro lia fibabil' !  
Li kiom ofte nur por plaĉi nin akuzis  
Ĉe l'patro, kiu tiujn kazojn ĉiam uzis  
Por nin riproĉi, kaj por rekompenci lin,  
Ekzemple per diverskolora vest', — sed nin  
Li nur prigrumblas. Ho vi, familia plago,  
Kiel enpieda dorn' turmentas via ago !

## JUDAS.

Al patro mankas saĝ', al knabo la spertec'.

## LEVI.

Ne stulta estas li, sed pruvas pri lertec' !

## JUDAS.

La jaroj lin spertigos kaj lin plisaĝigos.

## SIMEON.

Kaj kio, se li siajn revojn realigos,  
Per kiuj li ĉagrenas al la famili' ?

## JUDAS.

Li nur deliras !

## LEVI.

Aŭ malkaŝas, kion li  
Kovas en sia kor' por estri la frataron !

## JUDAS.

Sed tiam ni pretigus tuj la kontraŭstaron.

## LEVI.

Kaj tio urĝas nun !

## JUDAS.

Ne klara lia cel' !

## SIMEON.

Klarega kiel tag' ! Ĉar ĝi montriĝas el  
La revoj liaj, kiujn li al ni konigis :  
Li revis, ke en kamp' la grenon ni garbigis.  
Stariĝis lia garb', la niaj klinis sin  
Antaŭ la lia. Ĉu vi, Judas, aŭdis ĝin ?  
Ni ofendite skuis kapon, kaj rifuzis  
Oreloj niaj aŭdi vortojn, kiajn uzis  
La frenezul'. „Ĉu do vi estos", diris ni,  
„La nia reĝ' ?"

## JUDAS.

Se kredas, stultaj estas vi !

## LEVI.

Li tamen ĝuis, kaj nin plie eĉ mutigis, —  
Kaj ankaŭ la gepatrojn, — kiam li daŭrigis :



„Mi revis”, diris li, „ke suno kaj la lun’  
 „Dekunu steloj staris en ĉielo kun  
 „Klinitaj kapoj, paliĝante pro la brilo  
 „De mia stel’”. Nu, frato, jen la klarpruvilo  
 Pri lia ambici’! Mutiĝis ni laŭ ver’,  
 Al patro plendis, kiu en kvazaŭkoler’  
 Respondis: „Kiel do? Ĉu ĉiuj ni adoru,  
 „Patrinoj, fratoj, mi, ĉiuj vin reĝo glori’  
 „Silentu, kaj ne plu rakontu pri l’afer’:  
 „Ĝi estas infanaĝ’ ridinda kaj ĥimer’.”  
 Jen ĉio! Jen kiel li fine lin defendis!

JUDAS.

Aŭskultu iom! Ĉu vi tion priatentis,  
 Ke post la Benjamin plej juna estas li?  
 Kiel do li disponus pri l’hierarĥi’!  
 Ĉu frato trompas fraton?

SIMEON.

Jes, Judas, jes, certe!  
 La patron li similas, lin imitas lerte.  
 La plej trompema faras sklavon el stultul’,  
 Forkaptas benon de l’unuenaskitul’,  
 Kaj Ezaŭ tro malfrue ploras pro la perdo!

LEVI.

Mi ĝuste tion volis diri por averto:  
 La patro ja spertulo estas en ruzec’:  
 Misuzis iam pri patrino favorec’,  
 Kaj Josef ruze nun influas patran koron:  
 Por nia hont’ li uzas tiun ĉi favoron  
 Por estri nin. Ĉu blindaj estas vi?  
 Sed: kiu ajn deziras esti sklav’, ne mi!  
 For tiu revemul’! Ne estas ni infanoj!  
 Sambonaj kiel li ni estas: samgentanoj!

SIMEON.

Vi pravas. Frapu lin, antaŭ ol lia frap’  
 Nin tuŝu! Moku lin! Kliniĝu lia kap’!

JUDAS.

Pripensu: tia ag’ multege sensacios!

LEVI.

Neniu vidos ĝin.

JUDAS.

La patro ja ekscios!

LEVI.

La baton lin dolĉigu per mensog’, trompad’.  
 La cerbon nian uzu por fantaziad’:  
 Ni diru, ke formanĝis lin sovaĝa besto.

JUDAS.

Kaj kion, se pruviĝas falsa la atesto?

SIMEON.

Pritio poste ni parolu; nun la far’:  
 Nukrompu, kaj en put’ lin kaŝu sub ŝtonar’!  
 Dum jaroj tiun puton oni ne frekventas.  
 Neniu do ekscios, se ni mem silentas.  
 Sufiĉe da parol’! Voĉdonu pri la plan’.

JUDAS.

Se Ruben ne konsentas, planas ni en van’.  
 Streĉate sen akord’ la ŝnur’ devas rompiĝi.  
 Jen Ruben venas. Mi lin volas konsiliĝi.

SIMEON.

Vi faru! Sed atentu bone pri la vort’:  
 Se vi kontraŭas, vin minacas sama sort’.

JUDAS. SIMEON.

JUDAS.

Vi ĝustatempe por voĉdoni prezentiĝas.

RUBEN.

Pri kio?

JUDAS.

Josef venos. Oni konsiliĝas  
 Mortigi lin, kaj korpon lian kaŝi for.



RUBEN.

Konsternas min parolo via ! Mia kor'  
 Bategas ! Kia kruelaĵ' ! Vi haltu, Judas.  
 Ĉu fratoj de la sama patro do aludas  
 Fratmurdon ? Ĉu ungegojn viajn frapos vi  
 En korpon fratan ? Ĉu do via la pasi'  
 Trapikos per la brusto frata patran koron ?  
 Ĉu al la maljunul' vi rabos plejvaloron ?  
 Mi abomenas ĝin ! Pro Di', silentu do !

JUDAS.

Ĉu mi silentas, ĉu parolas plue, ho,  
 Verdikton oni diros : ĉiuj ja konsentos.

RUBEN.

Ĉu jes konsentos ? Ne : la knabon mi defendos,  
 Kaj pledos mi por li ĝis mia lasta spir',  
 Ĝis lasta sangelves', ĝis lasta vorteldir' !  
 Pli aĉan planon homoj neniam projektis !

JUDAS.

Pretendas ili : sonĝojn siajn li elektis  
 Por meti sian piedon sur la nia kol'.  
 Almontras blinda patro kiel al idol'  
 Respekton por la juna filo dorlotata,  
 De kiu el ni ĉiu estas ĉikanata.  
 Pri ĉio Josef pravas : kulpas nure ni.

RUBEN.

Ha, kiu friponaĵ' ne hontas pro la fi' ?  
 Kaj ne forkaŝas ĝin malantaŭ vortornamo ?  
 Kiel ajn oni ĝin orumu, malbonfamo  
 Pri frاتمortig' ĉiam laŭ homa la raci'  
 Kondamnon havas. Kaj : ĉu revoj tiuj ĉi  
 Infanaĵ argumentas, por ke al ŝafido  
 Vi hurlo kiel lupoj ? Kial plue vi do  
 Envias al grizul', ke li kun Raĥelid'  
 Iom petolu, sin ĝojigu por profit'  
 Al sia maljunec' ? Ĉu tio do vin ĝenas ?  
 La patra korinklin' al Josef apartenas :  
 Natur' favoris tiun knabon iom pli

Ol nin. Malsamaj estas fruktoj. Tio ĉi  
 Neniul por venĝemo estas vin kialo,  
 Kaj malpli por konduki al mortigfatalo !  
 Se li naive traktis pri nia kondut',  
 Neniam li malice agis, kaj ne gut'  
 Da malbonvol' ĉe li justigas vian trombon  
 Da koleriĝ', superŝutantan la kolombon !  
 Piedfrapi floron en dekseks-deksepa jar'  
 Antaŭ l'okul' de Dio kaj de l'Anĝelar' !  
 Ho frato, aŭdu min : forlasu penson tian.  
 Eĉ se li kulpas, vi atentu aĝon lian.  
 Pardonu lin pro lia simplanim' ; pro Di',  
 De kiu venas vivo, kaj — se indas mi —  
 Pardonu minfavore ; helpu min laŭpove  
 Balzami vundon, por ke regu am' denove.

JUDAS.

Ĉu mi, pro Josef, risku iri en danĝer'  
 De l'vivo ? Jen tro granda risk' por mi, laŭ ver' !  
 Se provi volas vi por savi lian vivon,  
 Vi faru : kontraŭ ĝi ne havas mi motivon.  
 Nek tamen provos mi malhelpi al verdikt' :  
 Mi restos sen domaĝ' kaj ekster la konflikt' !

RUBEN.

Se vi ne helpas min, jam tio vin kulpigos.

JUDAS.

Ne gravas : oni Josef ne kun mi mortigos !

RUBEN.

Ĉu vi la frاتمortigon vidos sen dolor' ?

JUDAS.

Mi devas, ĉar neeble estas iri for.

RUBEN.

Vi ne por Josef, kiel decas vin, pledadis.

JUDAS.

Vi scias, ke la venĝ' jam longe minacadis.



RUBEN.

Sed ne mortigo, ĉu? Ho, kia maljustec'!

JUDAS.

Mi provis ĉe l'fratar' defendi lin laŭ dec'.

RUBEN.

Ĉu ne iliaj koroj montris indulgemon?

JUDAS.

Ekkoleriĝis ili, montris nur venĝemon!

RUBEN.

Okazu kio ajn, mi kontraŭagos ĝin.

JUDAS.

Vanhelpos vi al knab', malprofitigos vin.  
 Jen ili! Ne forgesu vian senhelpecon.  
 Iliaj la okuloj montras murdemecon!

RUBEN. JUDAS. SIMEON. LEVI.

RUBEN.

Kion mi aŭdis, fratoj? Kion farsas vi?

SIMEON.

Ne farsas; seriozas.

RUBEN.

Ĝin malhelpu Di'!

LEVI.

Ni jam decidis: vana estos kontraŭstaro.

RUBEN.

Ne donis mi la voĉon en via voĉaro.

SIMEON.

Ne gravas via voĉ'.

RUBEN.

Ĉu do pri ĉi-agad'  
 Decidis vi sen mi, via plej aĝa frat'?

LEVI.

Temas pri la honor': pri tio ni decidas.

RUBEN.

Libera estas voĉ'.

SIMEON.

Unu ne pli validas.  
 Ol la aliaj en ĉi tiu balotad'.

RUBEN.

Se fidon indas mi en tiu situad'  
 Vi valorigu ankaŭ voĉon de racio,  
 Ĉar temas pri mortpun', en kiu gravas ĉio,  
 Do interkonsiliĝ' ankaŭ, kaj konsider'.  
 Se ne, vin ŝargu lia sang', ne min, laŭ ver'!

LEVI.

Al ni vi lasu la verdikton, kaj nin fidu.

RUBEN.

Antaŭe tamen mian opinion vidu.

SIMEON.

Aŭdigu! Sed post tio ne parolu plu!

RUBEN.

La troa korinklin' de nia patro, — nu,  
 Vi kredu min, — al Josef, ruza la junulo,  
 Min tre ĉagrenis, pli ol vin, ĉar, plejaĝulo,  
 Mi klare ja komprenis, ke malsamfavor'  
 Devas konduki al malamo en la kor'  
 La via, kaj ĝi nepre naskas la mizeron.  
 Kun patro mi parolis, petis lin moderon  
 En tiu plifavor', admonis ofte lin  
 Al neŭtralec' kaj pac', ĉar tio ŝajnas min  
 Plej granda valoraj' en domo infanriĉa;





Lin atentigis, ke egalrajt' senkondiĉa  
 Por ĉiuj estas la plej bona garanti'  
 Por amo interfrata en la famili'.  
 Sed: malsukcesis ankaŭ mia bonintenco:  
 Finiĝis per grumblad', riproĉ' la konferenco!  
 Kaj tiam li per tiu multkolora vest'  
 Obstinon sian montris je preferatest',  
 Ĵaluzon nian provokante, ho blindeco!  
 Kaj tiam la junul' en sia malsaĝeco  
 Dufoje per revaĉoj humiligis nin  
 Je hont' de siaj fratoj, patro, kaj patrin'.

SIMEON.

Jes, Ruben, vi daŭrigu kiel vi komencis.

LEVI.

Vi ĝuste diras tion kion mem ni pensis.

SIMEON.

Pro kio Ruben do rifuzas helpi nin?

LEVI.

Li mem akuzas Josef kaj kondamnas lin!

RUBEN.

Mi bone vidis la eraron patran: ĝi ja  
 Ĉagrenis min. Sed kion faru mi? Car lia  
 Okulo vidis en Josef pli da merit'  
 Ol en aliaj, je ĉi ties malprofit'.  
 Mi ja ne povis malkonsili junan fraton  
 Komplezi patron, kiu montras la pliŝaton,  
 Kaj fondas la esperon sian nur sur li  
 Pro tio, ke al li natur' donacis pli  
 Da ecoj, kiuj plaĉas al la patra koro,  
 Kaj ilin uzi por profita la favoro.  
 Mi do silentis, kaj de tiam mi ne plu  
 Ankoraŭ intervenis, nur atendis, ĉu  
 La tempo ne kuracos kune la junecon  
 De Josef, kaj de l'patro troan partiecon.  
 Atendu, pensis mi, ne estu plu malpac':  
 Lamul' bezonas apogilon; la sagac'  
 De Josef lin subtenu dum lia grandaĝo.  
 Ĉiam de ies flank' en dom' venas domaĝo.

SIMEON.

Similas vi la kankron pro la reirad'!

LEVI.

Skorpion: pro en vosto la venenportad'!

RUBEN.

Parolon mian vi almenaŭ dum minuto  
 Aŭskultu: ĝi sendube indas je diskuto.  
 Pripensis ofte mi la kaŭzon de l'afer',  
 Kial plej junan apartenas la prefer'.  
 Ĉu tio estus, ĉar kutime lasta frukto  
 Montriĝas delikata, ĉar estas produkto  
 De sango malpli vigla, — aŭ ĉu eble ĝi  
 Estas objekto de la patra simpati'  
 Tial, ke li, estante jam sur la deklivo  
 Kaj baldaŭ alvenonte ĉe la bord' de l'vivo,  
 Per ĝi esperas reviviĝi post la fin'  
 De sia viv', — aŭ timas, ĉar mortis patrin',  
 Lea, duonpatrine l'orfon pritraktante,  
 Aŭ Bilha tro malame, Zilpa samagante,  
 La Sara'idon sendos laŭ Ismaela voj'?  
 Estu! La partiec', jen kaŭzo de malĝoj'  
 En familioj; kaj senpartiec' neniam  
 Ekzistas: Isaak ankaŭ jam preferis iam  
 La filon Ezaŭ, kaj Jakobon la patrin'.  
 Pesil' kliniĝi povas nur laŭ unu fin'.

SIMEON.

Se volas vi prediki, vi al arboj penu!

LEVI.

Ni elrigardu: la revul' ja baldaŭ venu!

RUBEN.

Aŭskultu: pri la revoj ankaŭ jesas mi:  
 Ili troigas, estas revoj, sed ne pli.  
 La revoj tre proksimas al la mensogaĵo:  
 Trezor' en nokta rev' montriĝas neniaĵo;  
 Ruindisfalas konstruaj' sur tia ter'.



Pripensu ankaŭ, ke ankoraŭ la afer'  
Pri la Sihem'a murd' okupas la ĉi-ulojn,  
Kaj pro disput' forbatos ili nin, fremdulojn,  
Pro l'sango, kiun sorbis la ĉi tiu land'.

SIMEON.

Ĉu tion vi riproĉas nin, hipokritant'?

LEVI.

Ho, hontu vi, kiu patrinon seksatencis.

SIMEON.

Sangadultulo vi! Pri kio vi komencis!

LEVI.

Ĉu vi riproĉas nin pri l'sango de Hemor?

SIMEON.

El tio kaptis li plimulton de l'trezor'!

LEVI.

Ni venĝis la hontigon de l'fratino Dina.

RUBEN.

Ne estas, fratoj, mi iom ofendinklina.

SIMEON.

Venenon portas li en kor', mielon sur lang'!

LEVI.

Ĉe l'patro portis li la honton sur la vang'!

SIMEON.

Pro kio do aludi pri la venĝ' fratina?

LEVI.

Ni pli trankvile vivis post la venĝ' de Dina!

RUBEN.

Sed nun afer' alia: tiam punis ni  
Por la honor' de l'sang', nun furiozas vi

Al simpla knab', venanta kun la patra beno,  
Volante frate vin saluti ĉe l'alveno.

SIMEON.

La benon li rezervu tute por si mem!

LEVI.

Ni tuj la finon metos al lia revem'!

RUBEN.

Ĉu nia sankta gent' mortigos do fratulon?

SIMEON.

Ĉu nia sankta gent' indulgas adultulon?

RUBEN.

Pro kio, fratoj, vundon resangigas vi  
Apenaŭ kuracitan? Ĉu utilas ĝi?  
Avertas mi: troviĝas monstro tutproksime.  
Ĉu vi ĝin hurli aŭdas tuttrankvilanime?

LEVI.

For via monstro!

SIMEON.

Ne timigas min la best'.

RUBEN.

Terura monstro estas! Kovas ĝi en nest'  
En profundega kav' sur malbonecaj idoj',  
Formanĝas propran koron plenan je perfidoj.  
Mien' mortpalas, for de ĉiu turnas ĝi  
Rigardojn siajn, for de lum' kaj ĝojradi'.  
La blua ŝaŭmo kreskas sur la akraj dentoj.  
Venen' pezigas langon, siblas pri fisentoj  
El ĝia buŝ'. Kaviĝas vangoj sub la krust'  
El ŝimo; verda gal' puŝiĝas el la brust'.  
Homsangon ĝi sorbtrinkas, ĝue ĝin travadas.  
Ostar' nur estas korpo: nure ĝin formadas  
Sensukaj, senmedolaj ostoj. La ĉagren'  
Ĝin nure priĝojigas. Dormo venas en



Okul' neniam. Torturisto en intesto  
La renojn pikdoloras. Tiam la fibesto  
Laŭtege blekas pro dolor' en agoni'.  
Abomeninda best' ! Ĝi nestas inter vi !

SIMEON.

Mi kredas, ŝercas vi, la fratojn vi mistifas.

LEVI.

Kiel la best' nomiĝas ? Kion ĝi signifas ?

RUBEN.

Jen ĝia nom' : „Envi'“, kiu ne sen dolor'  
La idojn siajn naskas en de l'homoj kor'.  
Ho fratoj, aŭdu min ! Malhelpu al la besto  
Eniri nian domon, ĉar ĝia enesto  
Plenruinigos familion en honteg'.  
Tion malhelpu Di', malgraŭ la maldankeg'  
De via flanko. Restu for de vi la honto.  
Sed mi certigas vin : pravigos min estonto.  
Okazu kio ajn, sed, fratoj, ho, pro Di' :  
Naŭ fratoj kontraŭ unu ! Prirespondu vi !

SIMEON.

La respondec' al vi, kiu ja lin defendas.

LEVI.

Ni kontraŭ tiu ŝirmu nin, kiu ofendas.

RUBEN.

Se estus for apog' de l'patra maljunec',  
Faligus vi la patron, kies ruinec'  
Ruinfaligus ankaŭ nian familion  
En grandan mizeregon. Ho, evitu tion !

SIMEON.

Jen li de l'urbo venas rekte tien ĉi.

LEVI.

Sufiĉas, Ruben. Nin ne plu incitu vi.

RUBEN.

Imagu, ke l'infan', la fratojn salutante,  
La larmojn sur la vangoj, kaj pardonpetante  
Sin ĵetos ĉe la piedoj viaj : ĉu do vi  
Kuraĝus lin minaci eĉ per venĝokri' ?  
Kiu incitus tigron al disŝiratako  
Kontraŭ infano sen armilo en la brako ?  
Ĉu farus vi, kion ne farus eĉ leon' ?  
Al surgenua vir' ne pensas pri malbon',  
Nek al infanoj, kiuj kiom Josef aĝas,  
Ĝi tuŝas, se ne pro malsato ĝi sovaĝas.  
Ho, Josef la indulgon nian indas li !  
Mi iru por saluti lin jam antaŭ vi.

SIMEON.

Virestu !

LEVI.

Ne foriru paŝon, pro la vivo !

RUBEN.

Min lasu ! Se ne, krios mi de ĉi-deklivo,  
Ke ĝis Sirio ĝi kaj Mambre sonos for !  
Min lasu ! Helpu, Judas ! Pro via honor' !

SIMEON.

Silentu, aŭ mi frapos !

LEVI.

Ĉu en kor' ponardon ?

RUBEN.

Halt ! Fratoj, mi metiĝas sub la vian gardon.

LEVI.

Nu, Judas, lasu : mi ne plu atakos lin.

RUBEN.

Ĉar ŝajnas nefareble repacigi vin  
Kun Josef, kaj la fajron de malam' estingi,  
Permesu unu peton.



SIMEON.

Tempon plu forsvingi!

LEVI.

Rapidu! Tuj parolu! Kion petas vi?

RUBEN.

Mi petas, ke okazu al la knab' neni'  
Antaŭ ol la ĉi-tago estos forpasinta.

SIMEON.

Jes, punu lin, kiam li estos forkurinta!

RUBEN.

Mi vin promesas, ke nenion diros mi  
Pri tiu ĉi propono. Nun, pro la pasi'  
Tro arda vi ne juste povas lin punadi,  
Ĉar blinda venĝo igas poste bedaŭradi.  
Pro kio malutilus iom da prokrast'?  
Ne estas tio kontraŭ via rajt' kontrast',  
Se unu tagon vi la vivon plilongigos  
De tiu knab'. Vi intertempe lin loĝigos  
En tiu puto. Li pereu pro soif'!  
Vi sange ne senigu lin de l'juna viv'.  
Hontige estas, vivon fratan ja domaĝi,  
Sed plej hontige, fratan sangon forverŝaĉi.  
Gardu bonfamon. Metu lin en tiu put',  
Por ke de lia sang' perdiĝu eĉ ne gut'.

SIMEON.

Jes, tiu ĉi propono estas akceptebla.

LEVI.

Li fine venas kun konsilo plenumebila.

SIMEON.

Kiu konsentas, jesu!

LEVI.

Ĉiuj diras: jes!

SIMEON.

Jen venas la revul'.

RUBEN.

Nu, fratoj, pri promes'  
La via mi bonfidas. Nun mi lokŝanĝigos  
La bestojn.

LEVI.

Do, adiaŭ!

RUBEN.

Mi ĝin bonordigos!

ANĜELARO.

KANTO.

Venas la knab' en frata rond'  
Kiel la cervo ĉe la font',  
Volante trinki for soifon'  
Per freŝa akvo, sen konsci'  
Pri la ĉasistoj tie ĉi,  
Kiu minacas ĝian vivon  
Kaŝobservante en mallum'  
Kun lanco kaj pafarko, dum  
Ĉashundoj kuŝas kaj silentas.  
Ĝis kiam en subitmoment'  
La nobla best' en angorsent'  
Kaptita en embusk' sin sentas,  
Kaj ĉirkaŭata sen esper'  
De ĉiuspeca mortdanĝer'!

RESPONDKANTO.

Li venu! Kiel fiksas sin  
La perloj en la konk', patrin'  
De l'perloj, tiel varmaj larmoj  
Venos sur perlamota vang'  
De la junul' de nobla sang'.  
Densiĝu, ho, iliaj ĉarmoj  
Al perloj alta de valor',  
Por ke per ŝnuro el puror'



Ili pendiĝu ĉirkaŭ kolo,  
Kiam ni festas en plenĝoj',  
La virtojn, pura de aloj',  
Laŭdegas per la aŭreolo.  
La tombo lia laŭdos lin,  
Ĉar floras la virtec' sen fin'!

### PLUKANTO.

Belesti devas antaŭulo  
De perfektaĵo sen makulo.  
Kiu antaŭas sur ĉiel'  
La sunon, fonton de klareco,  
La Dian bildon de vereco?  
Kiu, se ne la Matenstel'?

### TRIA AKTO.

JOSEF. SIMEON. LEVI.

JOSEF.

Salutas vin la patro, karaj fratoj, kiu  
Al vi min sendas, por ke iom li eksciu,  
Kiel estas al vi, kaj ankaŭ al brutar'.  
Li sendis min al Siĥem por vin trovi, ĉar  
Li tie kredis vin. Maltrafis mi la celon,  
Ĉar vane ĉie serĉis. Kredas mi: anĝelon  
La patran dankas mi la vojon tien ĉi,  
Ĉar, laca rondvagante, kaj pensante pri  
Reiro al Hebron kaj domo familia  
Sen ia ajn informo pri la sorto via, —  
Kio ĉagrenus nepre patron, ankaŭ min, —  
Mi tuthazarde (aŭ ĉu Dio volis ĝin?)  
Renkontis iun, kiu min afablakore  
Demandis: „Kion do vi serĉas jam plurhore?”  
Rakontis mi la celon, kaj li senhezit'  
Vojmontris tien ĉi, kaj, dum afabla rid'  
Flagretis en okuloj liaj, li pludiris:  
„Laŭ mem ekaŭdis mi, la viaj fratoj iris  
„Al Dotan. Vi do ne ĉi tie serĉu plu,  
„Sed iru tien.” Dankis mi, sed pensis, ĉu  
Spirito ĉiela min aperis: rozodoro  
Flariĝis, ŝajnis li sendit' de l'anĝel'horu.  
Adiaŭante mi foriris. Bonodor'  
Survoje pendis. Mi ekhaltis iom, por  
Rigardi malantaŭen, iom min turnante:  
Ne kiel homo li paŝadis, sed ŝvebante.  
Ĉu estis li anĝel' ĉiela, kiu el  
La vojeraro gvidas homon al la cel'?  
Ĝi estu kiel ajn. Mi, dank' al Di', sukcesis  
Vin trovi sanaj, fratoj. Mia koro ĉesis  
Timbati. Nun mi ĝojas, ĉar via vizaĝ'  
Montras bonfarton. Scias mi, ke informaj'  
De mia flank' al patro estos tre bonvena,  
Kiam mi venos de vojaĝo ĉi tien'a.  
La patro, avo, same ankaŭ patrinar',  
Scivolas, kiel fartas vi, kaj la brutar'...



Sed, ve! Ho fratoj miaj, kio al vi estas,  
Ke vi vizaĝturnante ja silentaj restas?  
Rigardas malafable sen ia parol' ?  
Ho fratoj, ĉu mi venis kontraŭ via vol' ?  
Aŭ ĉu, junul', mi ne salutis vin laŭdece ?  
Pardonu min! Kiel mi agu bonvolece ?  
Ne indas mi respondon: nure kulpas mi!

SIMEON.

Ha, jen la hipokrit'! Nin enuigas li,  
Kaj ĉu vi ne parolas?

LEVI.

Ha, vi, reĝo nia!

Revula Moŝto!

SIMEON.

Kial nin honoras via  
Vizito? Ĉu denove por denunci nin?

LEVI.

Rakontu, revemul', la revojn, kiuj vin  
Vizitis. Vi priskribu vian reĝan rolon.

SIMEON.

Kial silentas vi? Ĉu perdis vi parolon?

JOSEF.

Ho fratoj karaj, antaŭ viaj piedoj mi  
Ĵetiĝas kaj petegas: min pardonu vi!

LEVI.

Leviĝu, ĉar ne decas al reĝa animo  
Surgenuiĝi en la polvo! Kia krimo!

SIMEON.

Vi diris, ke la patro estis sun', patrin'  
La luno, steloj ni, ĉu ne?

JOSEF.

Ho fratoj, min  
Permesu iri for. Mi volas submetiĝi,  
Kiel ja decas.

SIMEON.

Haltu! Decas vin stariĝi!

LEVI.

Nu, reĝo Josef, kiu estos ĉevalist' ?  
Skribisto via? Ĉambelan' ? Kiu verŝist',  
Portonte vinojn karajn el la reĝa kelo ?  
Kaj kiu servos kiel mulo? Aŭ kamelo ?  
Vi venu, Naftali! Vi venu, Zabulon!  
Vi, Asser, Isaĥar, Gad, Judas, Simeon  
Kaj Dan! Jen do la garb': kliniĝu garbo via!  
Kliniĝu, steloj, sun' kaj lun': jen lumo lia!

SIMEON.

Bastonon prenu for! Konduku lin al put'!

JOSEF.

Ho fratoj!

LEVI.

Tuj! Sen plor'! Perdiĝu ne minut'!

RUBEN.

Jen la malnova put'. Mi restu ĉi-ĉirkaŭe.  
Sed estas konsilinde, scii jam antaŭe,  
Ĉu eble akvo trovas sin sur ĝia fund',  
Veninta de l'montar' de post la pluvabund'.  
Jen kuŝas ŝtono peza. Ĝi nun pruvon donu.  
Mi ĝin faligos en la puton, por ke sonu  
Ĝi sur la fund'. Ĝi falas: nun aŭskultu mi...  
Ne plaŭdas ĝi; pumfalas. Seka estas ĝi.  
Ho mia kara put', vi estos la savanto  
De la plej kara fil' de Jakob. Diamanto  
Tre altvalora kaŝiĝos en via sin'  
Pli kompatema ol naŭ fratoj liaj lin  
Pritraktas: ĉiuj frاتمurdistoj! Mi vin laŭdos  
Ĉe mia patro finvivanta, kiam aŭdos  
Li, kiel mi per via help' lin savis el  
La mortdanĝero, mi, Ruben, la savanĝel'!  
Ĉar ho! mi vidas lin plorante Josef kisi,



Kaj larmojn de l'sulkplenaj siaj vangoj viŝi!  
 Kiom utilas vi! Kiom vi helpas min  
 Efektivigi planon por forsavi lin,  
 Junbranĉon el maljuna trunko, jam nesuka,  
 Almenaŭ ne sufiĉe por la korp' kaduka!  
 Kiom malsekajn lipojn premos freŝa buŝ',  
 Kaj kiom ĉirkaŭbrakos patro en kortuŝ'  
 La filon, kiun li jam forperdita kredis!  
 Kaj kiom li min dankos, ĉar ne nur porpledis,  
 Sed ankaŭ savis mi la fraton! Tiam min  
 Prilaŭdos ĉiu, samkiel aŭdigos sin  
 Mallaŭdoj pri la fratoj, kiuj humiliĝos  
 Eĉ pli profunde, ol nun Josef enputiĝos!  
 Sed nun silentu mi. Jen venas la fratar':  
 Antaŭe Josef. Ho, kia venĝkria far'!  
 La kara knabo viŝas larmojn el okuloj.  
 Ho, tigroj! Ĉu vi vere estas eks-homuloj?  
 Kaj ĉu vi de l'homeco portas ŝajnon nur?  
 Kaj estas pli danĝeraj ol besta terur'?  
 Ĉar tiujn oni konas pro dentoj, ungegoj!  
 La knabo preskaŭ svenas sub tiuj timegoj.  
 Kie mi kaŝu min en iu kreskaĵar'?  
 Jam proksimiĝas ili. Mi kaŝiĝu, ĉar  
 Se ili aŭdas min pro branĉa susurado  
 Endanĝeriĝus mi, kaj de Josef savado.

SIMON. LEVI. JOSEF.

SIMEON.

Ploraĉu poste! For la arlekena vest'!  
 Formetu, diras mi.

LEVI.

Ne iras vi al fest'!

JOSEF.

Ho fratoj, aŭdu min kaj mian veploradon:  
 Ĉu tiom krimis mi? Ho, montru vi kompaton!

SIMEON.

Demetu do la veston!

JOSEF.

Kial kulpas mi?

LEVI.

Rapidu do!

JOSEF.

Ho patro! Kia tragedi'!

LEVI.

Vi spertos la rezulton de revado via  
 En jena put'!

JOSEF.

Ĉu estas tie ĉi nenio  
 Estaĵ' por min defendi kontraŭ la kondukt'  
 De miaj fratoj?

SIMEON.

Mortos vi en tiu put'!

JOSEF.

Ĉu dronos mi en puto?

LEVI.

Vi ne trinkperdiĝos!  
 Kontraŭe: pro soif', ĉar akvo ne troviĝos.

JOSEF.

Ĉu estos do soifo kaj malsat' la pun'?  
 Ho, fundon mi ne vidas! Brilas sun' nek lun'!

SIMEON.

Vi ilin sonĝe vidos, ankaŭ ja la stelojn!

JOSEF.

Mi ne malicis, nek incitis la kverelojn.

LEVI.

Vi ne malicis! Sed nun flatparolas vi!



JOSEF.

Ĉu mi do kulpas, ĉar pri steloj revis mi?

LEVI.

Ĉu kulpas vi, instruos put' al vi lerneje:  
Honoru pliaĝulojn, viajn fratojn pleje,  
Sed antaŭ ĉio la gepatrojn. Kiu sin  
Tro alte levas, tiu falos ĉe la fin'.

JOSEF.

Mi por ĉielo kaj Anĝeloj veratestas,  
Ke mia koro ĉiam obeema estas  
Al patro, la patrinoj, tuta famili'.  
Vi ne rigardu miajn revojn kun envi'.  
Ho, se vi vidus mian koron ja interne:  
Neniam ĝi enhavis trompon vin koncerne.

SIMEON.

Kiom cedema li nun estas, la bravul'!  
Kiel vi nomas do la faron, denuncul',  
Kiam ĉe l'patro vi akuzis nin pri krimo?  
Ĉu tio estis ankaŭ via simplanimo?  
Aŭ ĉu hontigon celis via malicec'?

JOSEF.

Homo eraras! Ne ekzistas perfektec'.

LEVI.

Eraras...! Diversfoje!

JOSEF.

Vi do min pardonu!

SIMEON.

Ho jes: por ke la patro niajn agojn konu!

LEVI.

Domaĝ' plej grava venus laste, kiel feĉ'!

SIMEON.

Prefere malaperu li, jes, mortu eĉ!

LEVI.

Demetu l'veston!

JOSEF.

Al mi lasu la kostumon!

SIMEON.

Ĝi ne utilas vin.

LEVI.

Li timas malvarmumon!

JOSEF.

Se Benjamin mi povus kisi antaŭ mort'!

SIMEON.

Nescias li pri vi, nek pri la via sort'.

JOSEF.

Jus antaŭ la forir' mi petis lin kiseton.

LEVI.

Ĉu li vin konis?

JOSEF.

Jes, li donis min rideton,  
Sed, ja, lastfoje... Ho, ne pensis tiam mi...  
Jen mia vest'...

SIMEON.

Kaj nun iom rapidu ni:  
Neatendite nin rimarki povus iu.

JOSEF.

Kompatu, fratoj! Mi ĝin diros al neniu.

LEVI.

Prizorgis ni, ke al vi mankas la rimed'.

SIMEON.

Donu la ŝnurŝtuparon!



JOSEF.

Vana mia pet'!

LEVI.

Bezonos vi flugilojn : tiuj vin savigos.

SIMEON.

Atentu ! Mi la ŝnuron nun al ring' nodligos,  
 Aŭ tiu rad' rompita.

LEVI.

Bonatentu ! Se  
 La ŝnuro tromallongas iom, tiel ke  
 Ĝi ne ĝisfundos, tiam li ĉe l'fin' pendados !

SIMEON.

Li tiam saltu !

LEVI.

Ne : anĝelo lin portados  
 Sur manoj siaj, lin sidigos en la ŝlim' !

SIMEON.

Kaj se anĝel' forestas...

LEVI.

Tiam li pro tim'  
 La nukon sian rompu ! Nu, ja des pli bone !  
 Surĉevaliĝu ! Ĉion faru laŭordone !

SIMEON.

Surpaŝu, kaj vi tiam funden grimpu for !

JOSEF.

Pardonu, Di', al ili !

SIMEON.

Ĉesu via plor' !

JOSEF.

Lastfoje mi korsentojn miajn komuniku.

LEVI.

Sep tagojn en ĉi tiu puto vi prediku !

JOSEF.

Iom da akvo donu min : soifas mi.

LEVI.

Vi prenu per la man' : malpura estas ĝi,  
 Sed tamen la soifon ĝi al vi forigas.

JOSEF.

Mi dankas ! Iom pli ! Ĉi tio min freŝigas.

SIMEON.

Nun grimpu. Metu piedon vian en la ŝnur'.

LEVI.

Malsupren !

JOSEF.

Fratoj, patron vi konsolu nur...

SIMEON.

Li ne bezonos !

LEVI.

Malrapide li moviĝas.

SIMEON.

Ĉu funde estas vi ?

JOSEF.

Ne jam.

LEVI.

Nun li troviĝas  
 Sur fundo. Supren nun la ŝnur' ! Foriru ni.

SIMEON.

Finiĝis la labor'. Valoras plene ĝi  
 Trinkadon kaj manĝadon : jam la sun' ardiĝas.



## LEVI.

Ni serĉu lokon freŝan, kiu subombriĝas.  
Plendadas li: kiom malgaja la sonad'!

## SIMEON.

Aŭskultu dum moment'.

## LEVI.

Ne plaĉas min aŭdad'.

## SIMEON.

Se iu aŭdas ĝin, la voĉo nin perfidas.

## LEVI.

Ne forte sonas ĝi. Voĵetoj ne algvidas  
Al tiu loko. Malproksima estas ĝi  
De l'granda voĵ'. Pro tio ne pritimu ni.

## JOSEF.

Ho Dio mia, ĉu do restos vana  
Plorado mia? Ĉu via vizaĝ'  
Kaŝiĝas antaŭ la okul' infana  
En tiu ĉi kaverno, putkavaĵ'?  
Mi vidas volbon de la bluĉielo  
Tra nubaero kaj akva vapor',  
Kaj la brilanta sun' estas sen helo.  
Neniu ploron aŭdas de la kor'!  
La putresono eĥas ĝemon mian,  
Kaj reaŭdiĝas ĝia lasta son'.  
La ŝtonoj montras la kompaton sian:  
Mi petas pri „pardon”, mi aŭdas „don”.  
Se dankas mi al Di', kies kompatato  
Konsolas min, ĝi ree diras: „Di”.  
Post „Benjamin, junfrato” sonas: „frato”.  
Mutiĝas Josef, tuj silentas ĝi.  
Ho, fruktoj de envi', kiom amaras  
En gorĝo vi, senspira pro dolor'!  
Mi kion aŭdas? Kion oni faras?  
Kio okazas? Reesperas mia kor'!

## RUBEN.

Ho, la frataĉoj enterigis la ŝafidon!  
Jen ili iras, ŝajne homoj! Sangavidon  
Nutradas ili. Jen ilia fiagad'!  
Feliĉe mi ne perfidiĝis per kriad',  
Ĉar mi apenaŭ povis min de ĝi reteni.  
Jes, Ruben, kial vi ne faris? Ĉar kuntreni  
Ja povus ili vin en sama put', sed vi  
Ne kune kulpus pri la sama krim'. Per ĝi  
La patro eble nun jam grave malsaniĝis.  
Sed ne: por savi lin post arbo mi kaŝiĝis.

## JOSEF.

Kiu do estas vi? Min helpu el mizer'!

## RUBEN.

Li krias! Dank' al Di'! Revivas la esper',  
Ke povos helpi mi. Jes, Josef, karul' mia!

## JOSEF.

Ruben, elsavu min!

## RUBEN.

Mi venos, frato via,  
Infano, koro mia, vi ne ploru plu!

## JOSEF.

Elsavu min!

## RUBEN.

Ho frato, mi jam serĉas, ĉu  
Mi trovas ŝnuron, sed ne vidas. La vestaron  
Disŝirus mi por plekti ŝnuron. Ŝtupetaron  
Ne trovas ankaŭ mi. Havu paciencon nur:  
Mi certe antaŭ sunkulmino venos sur  
La saman lokon por vin savi. Nun danĝere  
Por mi fariĝus resti, ĉar ili laŭvere  
Tre timas nun perfidon. Mi forkaŝu min.  
Mi restis al Josef fidela. Trafis vin  
Ĉi tiu malfeliĉ' laŭ mia plan', sed nure,  
Por ke sukcesu mi forsavi vin forkure.  
Pardonu min pro tio. Nun mi iras for.



JOSEF.

Ho Ruben, aŭdu! Ne min lasu en dolor'!

ANGELARO.

KANTO.

Ni ŝatas, por tiu malhelo  
 Senesti de la lum' de l'ĉielo:  
 Tia mallumo estas pli  
 Belega ol la sunradi'.  
 Regas ĉi tie atmosfero  
 Ĉiela, kvankam sub la tero,  
 Ĉar lumoj en la firmament'  
 Ne estas kiel la arĝent'  
 De l'buŝo lia: hela luno.  
 Okuloj klaraj sub la suno  
 De l'frunt' similas al stelpar'.  
 La silkaj haroj en bukлар'  
 Ilin ĉirkaŭas, kaj similas  
 Radioj, kiuj perdforbrilas  
 En la krepusko. Bela pli  
 Ol matenruĝo estas ĝi,  
 Aŭ de l'vespero lasta brilo.  
 La brovoj, vangoj, sub kovrilo  
 De delikata silkvual'  
 De la nebul', similas al  
 Teksaĵ', tra kies brunkoloro  
 La lumo sparkas kiel oro.  
 Jen belartaĵ', kies belec'  
 Pliiĝas per ombra nigrec'.

RESPONDKANTO.

Leviĝos li, kaj en palacoj,  
 Kie saĝulaj la sagacoj  
 Al homo ne sufiĉas, li  
 Per saĝo sia, grac' de Di',  
 Brilados. Sed nun lin sufero  
 Atakas, antaŭ ol en sfero  
 Pli alta, en favor' de l'kron'  
 La reĝa, antaŭ ora tron'  
 Li staros. Tiam la popoloj

Lin benos. Sed antaŭ ol roloj  
 Ŝanĝiĝos, jaroj da ekzil'  
 Alvenos antaŭ la ekbril'.  
 Akuŝon antaŭas doloroj.  
 Jen fakto ĉe la gravlaboroj.  
 La kverko kun multfoliar'  
 Kaj kun grandega la branĉar'  
 Bezonas multe da aero,  
 Kaj tondra kaj ventegvetero  
 Ĝin fortatakos. Tial ĝi  
 Nur malrapide kreskas pli  
 Kaj pli, por taŭge kontraŭstari  
 La fortojn, kaj ĝi devas fari  
 Fortikan trunkon, kaj sub grund'  
 Radikojn formas ĝis profund'.

PLUKANTO.

Mi vidas la Jakob'ajn idojn  
 Paŝtantaj, bruton kaj brutidojn  
 Ĉe l'alta arb'; la vasta greg'  
 Sin nutras flanke de flueg'  
 Mondfama, per herb', trifolio.  
 Kaj jen: kampara melodio  
 Eksonas de paŝtista flut',  
 Kaj kvazaŭ trapenetras ŝut'  
 Da korgajeco la pejzaĝon!  
 Dankeme portas ĝi omaĝon  
 En tiu lando de gastam'  
 Al granda Di' de Abraham.



## KVARA AKTO.

LEVI. JUDAS. SIMEON.

LEVI.

Sidiĝu, fratoj, kaj forgesu ni trinkante  
 Estintajn zorgojn, interfrate kunsidante.  
 Ekmanĝu! Estas tie ĉi konvena lok':  
 Naturo per la verdhedero sur la rok'  
 Ornamas la manĝejon per naturtapiŝo,  
 Kaj arba multbranĉaro kaj folia riĉo  
 Protektas kontraŭ jam ardanta nuna bril'  
 De l'sun', kaj nin invitas sidi en trankvil'  
 En freŝa ombro. Vin' bongusta vin freŝigu!

JUDAS.

Jes, trinku vinon, fraton vi soifmortigu!

SIMEON.

Kion vi diras, Judas?

JUDAS.

Ne parolas mi.

LEVI.

Ĉu vi komforte sidas?

JUDAS.

Jes, sufiĉas ĝi.

SIMEON.

Sidiĝu tie ĉi: faru al vi komforte.

LEVI.

Tio bonigas manĝon.

JUDAS.

Diras vi ĝustvorte!

SIMEON.

Nu, ĉu pli bone?

JUDAS.

Jes, vi ne demandu plu.

LEVI.

Ne, diru! kio tiom ĝenas vin?

JUDAS.

La ŝu'.

LEVI.

Kie?

JUDAS.

Maldekstrapiede, eble pro la bukoj.

LEVI.

Vi mem ja sciu!

JUDAS.

Kredas mi, tro premas tukoj  
 Ĉe l'koro. Nun libere spiri povas mi.

SIMEON.

Vi ĉiuj servu vin.

JUDAS.

Ĉu ion aŭdas vi?

LEVI.

Ne mi.

JUDAS.

Ĉu eble krias Josef plorplendante?

SIMEON.

Neeble! Vento ne aŭdigas ĝin blovante.

LEVI.

Kaj se li plendas, restas sama lia sort'!

SIMEON.

Bonege estas, ke li pentu antaŭ mort'.



LEVI.

Li kredis, ke nur ŝerco estis la grimpado!

JUDAS.

Mi kortuŝiĝis.

SIMEON.

Ĉu turmentis vin kompato?

JUDAS.

Li ja senhelpe ĉiufanken turnis sin.

SIMEON.

Al Hebron li rigardis, kiu helpas lin.

LEVI.

Alvokis li anĝelon sian por konsolo!

SIMEON.

Kiu direktis lin al Dotan pro bonvolo!

LEVI.

Kaj kiom guste trinkis for soifon li!

JUDAS.

Ĉiam soifas kor' en doloragoni'.

SIMEON.

Ha! Judas senparola ree nun aŭdiĝas!

LEVI.

Kion li havas? La okuloj malsekiĝas!

JUDAS.

Restu trankvilaj fratoj: nur trobatas kor'.

SIMEON.

Ĉu pro la sort' de Josef?

LEVI.

Pensu tion for!  
Vi ĝoju, ĉar forestas nun la ĉikanado.

JUDAS.

Ne decas, ke ni ĝojas pri la turmentado  
De frato. Tio ne kondukas al profit'.

LEVI.

Kion aludas vi?

JUDAS.

Mi timas pri perfid'.

SIMEON.

Neeble! Mi atentas puton. Mi singardas!

JUDAS.

Sed Dio vidas vin. Li ĉion trarigardas!  
Tra tuta via kor'. Ĉiam li vidas nin.

SIMEON.

Vi ne trotimu! Ne maltrankviligu vin.

LEVI.

Rigardu tien!

JUDAS.

Kio tie proksimiĝas?

SIMEON.

Jen karavano! Malrapide ĝi moviĝas.

JUDAS.

Kiom da polvo! Tute ĝin envolvas nub'.

SIMEON.

Nek ion mi distingas. Restas mi en dub'...

LEVI.

Vi kiuj ilin kredas?



SIMEON.

Pene, ĝin diveni.

JUDAS.

Kamelojn vidas mi.

LEVI.

Azenojn mi sin treni.

SIMEON.

Ankaŭ personojn kun armiloj vidas mi.

JUDAS.

Jen sparkas la pafiloj en la sunradi'.

LEVI.

Venas en mia kapo iu prikonjekto...

SIMEON.

Kio ĝi estas do?

LEVI.

Araboj.

JUDAS.

Laŭ aspekto

Vi povas pravi.

LEVI.

Jes, Araboj estas, ĉar

Ĉi-tempe ĉiam ili venas.

SIMEON.

La bestar'

Portadas pezajn ŝargojn, malfacile iras  
 Kurbitaj sub la pakaĵar'. Mi honte diras,  
 Ke hom' turmentas beston.

JUDAS.

Fraton same frat'!

LEVI.

Kion vi diras? Ĉu denove la korbato?

JUDAS.

Ho Josef!

SIMEON.

Ĉu ankoraŭ vi lin priploradas?

JUDAS.

Pri tio plendas vi, ke la bestar' sklavadas,  
 Sed Josef pli suferas ol tiu brutar',  
 Kiu nutraĵon havas. Tamen: via far'  
 Mortigas fraton pro malsato kaj soifo.

LEVI.

Pri tio nun paroli estas sen signifo.  
 Li havas sian punon.

JUDAS.

Peton havas mi.

SIMEON.

Kiun?

JUDAS.

Ke vi lin donu, por ke vendu mi  
 Lin kiel sklavon por servadi al Arabo.  
 Kadavre ja nur malutilas tiu knabo,  
 Eĉ se neniam malkovriĝos la sekret'.  
 Vi aŭdu la kialojn de mia propet':  
 Saĝeco Dia kreis membrojn plej utilajn  
 De l'korp' duope kiel nepre sinhelpilajn  
 Korppartojn. Ni amputas se necese nur  
 Unu el ili. Vi lin gardu por terur'  
 De l'morto, por eviti al vi mem ĉagrenon  
 Tre multan, ĉar per tio kaŭzos la forprenon  
 De memriproĉ' eterna el la via kor'.  
 Ne kiel Kain vi estas. Mi ĝin ĵetas for  
 El mia penso: frata sango lin makulis,  
 Kaj la de l'frato Abel sango ja postulis  
 Venĝadon. Jen: mortpala estis la aspekt'



De Kain. Lia kor' manĝiĝis, kaj la vekt'  
De lia kulpo multepezis. Kaj turmentoj  
Spiritaj montris sin: fantomoj kaj serpentoj!  
Angoro kaptis lian cerbon. Lia sem'  
Ankoraŭ portas la kondamnon. La emblem'  
De frاتمurdinto restis li. Jen diferenco  
Inter murdado kaj vendado. La esenco  
De l'krim' indikas la punadon. Laŭ mezur'  
Vi punu, kaj prefere pro kompato nur  
Malpli, ĉar frato Josef estas sen patrino.  
Kaj Raĥel de Jakob ankaŭ estis edzino.  
Severagante vi perfortus pri rilat'  
Duobla. Plie: vi per tiu ĉi agad'  
Meritos laŭdon pro la indulgemo via,  
Kaj gardos vin do kontraŭ kalumnio ĉia.

SIMEON.

Laŭvere, saĝe estas. Mi pravigas vin.

LEVI.

Ŝajnas, ke la bonec' de Di' konsilas nin  
Akcepti la proponon: povas mi konsenti.

SIMEON.

Ĉu ĉiuj do aprobas? Bone! Sed: lin vendi,  
Kiu prizorgos tion?

JUDAS.

Lasu ĝin al mi.

LEVI.

Tre bone. Baldaŭ ili estos tie ĉi.

JUDAS.

Menciu prezon.

SIMEON.

Ni ne longe marĉandadu.

LEVI.

Prezo ne gravas.

SIMEON.

Li nur baldaŭ for estadu!

JOSEF.

Ho Ruben, ĉu vizaĝon vian do por mi  
Vi kaŝas? Ĉu do plendoj miaj ne aŭdiĝas  
Ĉe Di'? Ĉu do en kav' mizera tiu ĉi  
De homoj nek de Dio ia sav' troviĝas?  
En ŝlim' mi sufokiĝas; al la plenaer'  
Pli freŝa mi sopiras. Jen la bluĉielo  
Alte sin montras. Mi kaŭradas en mizer'!  
Tutsola ploras mi en la profunda kelo,  
Kiu ja nure min respondas per reson'.  
Nur ĝi kompaton montras al mia doloro:  
Konsolon nure mi ricevas de la ŝton'!  
Se dankas mi al ĝi el fund' de mia koro,  
Redankon de la voĉ' putŝtona aŭdas mi.  
Sed Ruben nur silentas, li ne jam revenis.  
Kie do estas vi, ho frato? Ĉu eĉ vi  
Forgesis min? Ĉu eble mia plend' ĉagrenis  
Vin ankaŭ? Venu do, ho Ruben: la dolor'  
Per larmoj mian korsopiron pli emfazas.  
Ho Ruben, vi konsolu al la mia kor'!  
Mi ion aŭdas! Kio eble nun okazas?

KARAVANESTRO.

Ĉi tie mi ripozu ekster suna ard'  
En tiu ĉi verdaĵ', kaj dume l'avangard'  
De l'trupo preteriru. Knaboj, vi sciigu,  
Ke mejlon plidistance ĉe l'arbar' haltigu  
Servistoj la bestaron: ni ripozu dum  
La posttagmezo, kaj restados ĝis la lum'  
Forestos. Ni vojaĝos ree je noktmezo.  
La suno nun tro ardas, brulas ĝis frenezo!  
Sed, kiu venas? Ŝajnas esti fremdlandan',  
Ne devenanta el la lando Kanaän.  
Se akvon el ĉi tiu puto li deziras,  
Mi ankaŭ petos trinkon. Jen li jam aliras.



JUDAS.

Feliĉon, sinjor' moŝt', dum via longa voj'!

KARAVANESTRO.

Feliĉon serĉas ni, sed de l'trovado ĝoj'  
Kun pen' sentigas sin: ĝi loĝas ja en kriptoj!

JUDAS.

Kien sinjora moŝt' vojaĝas?

KARAVANESTRO.

Al Egipto:  
Portiĝas per la ŝarĝobestoj la balzam'  
Rekte de Galaad, ankaŭ mirho kaj cinam'.  
Ĉu akvo el la puto estas via celo?  
Mi lacas, ŝatus akvon.

JUDAS.

Tamen ne botelo  
Da akvo eĉ enestas. Fontoj estas jen.

KARAVANESTRO.

Ĉi tie mi ripozas, ĉar la trupon en  
Okulo havas, kiu post nelonge haltos,  
Antaŭ ol sun' tagmeza por ĝi troe altos.  
Aŭskultu! Kion aŭdas mi el tiu put'?

JUDAS.

Jen estas juna sklavo. Li pro miskondut'  
Tie suferas sian punon, kaj ploretas.

KARAVANESTRO.

Ĉu aĉetebla?

JUDAS.

Jes!

KARAVANESTRO.

Lin montru do, mi petas.

JUDAS.

Mi lin per tiu ŝnur' venigos el la put':  
Per ŝanĝ' de mastro ja ŝanĝiĝos la kondut'  
De tiu knabo. Jen la ŝnur'! Nu, suprenvenu!  
Jen venas li, Sinjoro, vi min bonkomprene:  
La koron vi ne juĝu laŭ la korpaspekt'.

KARAVANESTRO.

Hipokritad' ne ĉiam restas sen efekt'!

JUDAS.

Jen do la knabo. Mi antaŭe lin instruu,  
Por ke per lia babilad' vi ne enuu.

JOSEF.

Ho, Judas! Estas vi! Ho, vi kompatu min!

JUDAS.

Venu ĉi tien, iom flanke! Turnu vin!  
Pri kulpoj viaj justigantaj vian punon  
Mi ne parolu. Ke vi tamen nun la sunon  
Revidas, kaj ne mortos, dankas vi al mi.  
La fratoj, jes, konsentis, kondiĉe ke vi  
Al tiu ĉi Arabo servu. Do: rezignu!

JOSEF.

Al vi la vivon dankas mi: mi ne indignu,  
Sed, ho, sklavec' malinda! Ho, amara sort'!

JUDAS.

Komprenas mi, sed: preferinda sur la mort'!  
Jen nura via sav'. La fratoj nin kaŝvidas.  
Eviti ĝin vi do ne povas. Mi vin gvidas  
Nun antaŭ lin: vi ne parolu pri l'fratar'!

JOSEF.

Ho Ruben! Dio helpu min kaj Anĝelar'!

JUDAS.

Mi vendprezentas tiun sklavon, sed konsentu:  
Sen garantio!



KARAVANESTRO.

Mi antaŭe do atentu.

JUDAS.

Venu!

KARAVANESTRO.

Ĉu volas vi transiri do al mi?

JOSEF.

Volon ne havas mi, sinjor'.

KARAVANESTRO.

Ne ploru vi.  
Etendu vian brakon. Kiun aĝon havas  
Vi nun? Vi estas juna.

JOSEF.

Jes, sinjor', vi pravas:  
Dekses mi aĝas.

KARAVANESTRO.

Nu, kia estas dentar'?  
Malfermu buŝon vian! Kia blankperlar'!  
Nun iom irreiru!

JUDAS.

Vigle! Sen hezito!

KARAVANESTRO.

Nun saltu! Alte! Jes, ne mankas lin spirito.  
Sufiĉe da ludad'! La manon montru min!

JUDAS.

Pri manaŭgur' Araboj multokupas sin.  
Pri malfeliĉo aŭ feliĉo ĝi informas.

KARAVANESTRO.

Ĉu havas li talentojn?

JUDAS.

Revas, kiam dormas.

KARAVANESTRO.

Ne ĉiu tion povas: estas rekomend'!

JUDAS.

Pravege diras vi! Utilas ĝi al vend'!

KARAVANESTRO.

Nu, diru prezon. Ni ne trenu la aferojn.

JUDAS.

Kiom ofertas vi?

KARAVANESTRO.

Dudek arĝentmonerojn.

JUDAS.

Vendite.

KARAVANESTRO.

Ĉu vi timas, ke jam pentus mi?

JUDAS.

Al vi li pliutilas.

JOSEF.

Di', pardonu Vi!

JUDAS.

Vi flankeniru! Kion vi pri l'knabo kredas?

KARAVANESTRO.

Senkaŝe: ĝojas mi, ke nun mi lin posedas.  
Se estus postulinta vi pli multe, mi  
Tamen konsentus, ĉar mi opinias, li  
Nenion sklavan havas: ŝajnas nobelulo!  
Konsiderante laŭ la mano, li grandulo  
Fariĝos! Brovoj tiaj estas ne de sklav',  
Sed altrangulo. Mi ne pluon pri l'enhav'  
De l'mano diru, ĉar mi povas miskompreni.  
La koron konas Di', ni povas nur diveni.



JUDAS.

Ĉar priparolas vi, mi diros : tiu knab'  
Nur revas pri potenco. Ĉiam lia kap'  
Pri ĝi plenestas. Tio vekas la envion.  
Pli bone estas do, li iru en medion  
Al li pli fremda. Li vin daŭre plaĉu do !

KARAVANESTRO.

Venu !

JUDAS.

Vi havu do paciencon, kaj ne tro  
Vi pensu pri la revoj ; estu obeema !

KARAVANESTRO.

Jes, sub Ismaelido estu ne revema !

JOSEF.

Ismaelido, mia sort'  
Min metas sub la jugon vian.  
Mi preĝas Dion por la fort'  
Ĝin porti. Vi pripensu, kian  
Mizeron portis Ismael,  
Kiam kun Agar, la patrino,  
Li estis forpelita el  
La patra domo, por en fino  
Perei en dezerto. Sed  
Anĝelo montris al la fonto  
Saviga por la infanet'.  
Estu vi ankaŭ la savonto  
De mi, kiu de la patrin'  
Estis la koramata frukto,  
Kiel Ismael, kiam lin  
Kondukis Agar dum la lukto  
Kun minacanta morto en  
Senlima, seka dezertego  
Al ombro, kiel baldaken'  
Ŝirmanta, kaj tiam kriego  
Al Dio sonis : „Ĉu do vi  
„De mi forprenos karestaĵon ?”  
Kaj tiam ŝia emoci'

Trovis konsolon : profetaĵon  
Pri granda, glora la estont' !  
La Di' de Ismael vin benu  
Sur via voj' al horizont'  
Malproksimega, kaj vi venu  
Prospere ĉe la via cel'  
Kun mi, libera hom', vendita  
Maljuste kiel sklavo el  
La rond' de mia gent' blindita,  
Ismaelido, traktu min  
Afable. Dio benu vin !

KARAVANESTRO.

Ne estas mia task', esplori pri deveno  
La via : liberul' aŭ sklavo ; tamen jeno  
Nun estas via task' : konduku kiel sklav'.  
Venu, servistoj, ligu lin. La nura sav'  
Kaj helpo via estas la konduto deca,  
Ĉar bonan sklavon ŝatas mastro bonvoleca :  
Kiel la sklavo, tiel mastro montras sin.

JUDAS.

Adiaŭ ! Vivu longe !

JOSEF.

Patro ! Benjamin !

Ho Ruben, Ruben !

JUDAS.

Nu, vi ne tiom ploradu !

Feliĉ' al vi, sinjoro !

KARAVANESTRO.

Mono vin plaĉadu !

JUDAS.

Bonan vojaĝon do !

KARAVANESTRO.

Tion akceptas mi.

JUDAS.

Sentiĝas parenc' de l'sang'. Ja rampas ĝi,  
Kie ne iri povas. Kiom larmoj fluas !  
Mi bonintencis... Tial kulpon mi forskuas...



## ANGELARO.

## KANTO.

Altege, Arabujo, vi  
 Fieras pri feliĉo: ĝi  
 Similas al la streĉkrakad'  
 De l'arko via dum pafad'  
 Al aglo ŝvebanta en hel'  
 De plenodora la ĉiel',  
 Kie vivadas la Feniks'  
 Glorata en festona miks':  
 „Jen birdo mia sen egal',  
 „Donac' de Di' pro amo al  
 „Prapatro Abraham, de l'gent'  
 „Radik', kiu al Orient'  
 „Dissendis filojn de Agar  
 „Kaj Ketura, kies idar'  
 „Kreskadas ĉiam pli kaj pli  
 „Je spito de la ambici'  
 „De Isak'idoj, je ĉagren'  
 „De la Hebreoj". Vana ben'!  
 Silentu, Ismael, kaj vi,  
 Madian kaj Araboj, ĝi  
 Nur kant' malnova estas, ĉar  
 Ne nestas Feniks en arbar'  
 La mirta via, en intens'  
 De fajro via de incens'!

## RESPONDKANTO.

Nun mian birdon gloras mi!  
 La kapon tufan levas ĝi,  
 Kronata per brilradiar'  
 Ĉirkaŭ stel' hela. El la klar'  
 De la okuloj la majest'  
 Briladas. Sur la reĝa vest'  
 Montriĝas ora ĉirkaŭkol'  
 Kiel la suna aŭreol'  
 Ĝin ornamante. La reflekt'  
 De l'sun' blindigas pro l'aspekt'.  
 Natur' per sango sia ĝin  
 Koloras per skarlat', karmin',  
 Pli bela ol de l'reĝ' kostum'  
 Frapas okulojn. Ĉiu plum'

De l'blua vost' per rozbrodaj'  
 Kaj de rubenoj ornamaj'  
 Briladas pro juvelabund'  
 De belturkisoj sur la fund'.  
 Tiel ĉiela fajro kun  
 La ros' ĝin nutras kaj la sun'  
 Dum jarcent' kaj dum centojar',  
 Ĝis la forbrulo sur altar'  
 De l'sun'. Aperas nova id'  
 Sambela, kiu ĝin sur lit'  
 Postmorta metas, kies pomp'  
 Superas eĉ sur reĝa tomb'.  
 Jen mia Feniks! Kiu al  
 La mia estas la egal'?

## PLUKANTO.

Araboj blindaj, sciu vi:  
 Por eta prezo, laŭ de Di'  
 La volo, vi posedas nun  
 Fenikson la supreman, kun  
 Kiu ne egalpovas bird'  
 La via en arbar' de mirt';  
 Fenikson, kiun la malam'  
 Kaj la envi' en malbonfam'  
 Forpuŝis, mordis, pelis for!  
 Vi kun ĉi tiu grandtrezor'  
 Al sunurb' Memfis iras tra  
 Nuboj da sablo, polvo. Ha!  
 La urbo, kies obelisk'  
 Celas al la ĉiela disk',  
 Vidos, kiel la Nil-flueg', —  
 Lin dankas ĝi pri prospereg', —  
 Klinas kronon el sepbranĉar'  
 Por li, kies la saĝa far'  
 Superas al saĝula bril'!  
 Tie li mortos, kaj ĉe l'Nil'  
 Filparo por enbalzamig',  
 Idaro por la enterig'  
 Zorgados, tra river' kaj mar'  
 Lin portos meze de grandar'  
 Al tombo lia en Sihem,  
 Donac' de l'patro, pro laŭdem'.



## KVINA AKTO.

RUBEN.

Madianidoj en ĉirkaŭaj regionoj  
 Instalís la tendaron sian. La kolonoj  
 Nur malrapide marŝis. Fine la trankvil'  
 Revenis. Sun' tagmeza per intensa bril'  
 Nun fajre ardas: ĉiu zorge ĝin evitas.  
 En freŝa ombro oni dormas, aŭ nun sidas.  
 Ne fratojn vidas mi, ne ia homestaĵ'  
 Montriĝas kie ajn en tuta ĉirkaŭaĵ',  
 Kien ajn mi rigardas. Nenio atestas  
 Pri perfidemo de la flank' de l'fratoj. Estas  
 Nun tempo oportuna, ĉar nun aŭdas mi  
 Nenian vivon, nek bruadon. Helpu, Di',  
 Ke mi sukcesu savi mian fraton karan  
 El la malliberec'. Dolĉigu, Di', amaran  
 La sorton lian. Nun mi iru al la put'.  
 Sed, Ruben, bonatentu pri via kondut'!  
 Inspektu ĉirkaŭaĵon, ĉar neniú estu  
 Malantaŭ l'arbetar'. Plej singardema restu!  
 Neniun vidas mi kaŝita. Dank' al Di'!  
 Pendigu mi la ŝnurón. Josef, venu vi!  
 Rapidu! Tempon ni ne perdu! Supreniru!  
 Ne aŭdas mi la voĉon lian. Mi ĝin diru  
 Pli laŭte: eble endormigis lin plorad'.  
 Rapidu, Josef! Venu! Ho, kia dormad'!  
 Vi supreniru, Josef! Mi, Ruben, jam venis  
 Por savi vin!... Silento!... Eble li jam svenis!  
 Kion mi faru? Ĉar sufiĉe laŭte mi  
 Kriadis, ke dormant' vekigús ja per ĝi.  
 Kaj se pli laŭte mi kriegus, min la fratoj  
 Ekaŭdus. Kion faru mi? Ĉu la mordadoj  
 Serpentaj lin mortigis per sia venen'?  
 Ho, kiom da riproĉo mi nun sentas en  
 Konscienco mia! Dum la tuta mia vivo  
 Mi pentos, ke nur pro mia prokrastmotivo  
 La frato mortis! Kion al la maljunul'  
 Mi diru por konsoli lin? Ho mi, fiul'!  
 Mi en malluman puton nun malsupreniras  
 Por serĉi Josef, kaj por vidi, ĉu li spiras

Ankoraŭ, aŭ ĉu eble jam formortis li.  
 Sed... Kie estas Josef? Nun disŝiras mi  
 Vestaĵojn miajn! For li estas! Venu, lupoj,  
 Leonoj, ursoj, venu ĉiuj en grandtrupoj,  
 Kaj vi formanĝu fraton, kiu pri la mort'  
 De sia frato kulpas. Estu lia sort'  
 La mia! Trinku mian sangon! Vi silentas!  
 Pli kompatemaj ja ol ni, kiuj ne sentas  
 Kompaton eĉ pri nia frato. La bestar'  
 Eĉ ŝparas vivon de kruela fihomar',  
 Laŭkaraktere tigroj! Venu, fratoj miaj!  
 Plensutu puton: suno per radioj siaj  
 Ne brilu sur fihomo, kia estas mi!  
 La floroj velkas, herb' sekiĝas kaj foli',  
 Kie mi spiras. Aŭ ĉu mi en kavo kuŝas?  
 Ĉu leopardo min per dentoj siaj tuŝas?  
 Ne mordu, tigro, min. Ne indas kuŝi mi  
 En viaj la intestoj. Sun', ĉu brilas vi?  
 Aŭ ĉu la pala lun'? Mi mortu! Ne: vivadu!  
 Por ke mi traserĉante ĉie rondvagadu,  
 Por serĉi kie estas Josef, aŭ ĉu Ĥam-  
 Aŭ Amor'ido lin mortigis: la malam'  
 Plenrajte sur Hebrea gento premi devas!  
 Pro kio mi restadas tie ĉi? Mi levas  
 Min supren. Pravas vi, ho suno, ke al mi  
 La lumon vi rifuzas: la purecon vi  
 Ne makuligu albrilante min. Mi vidas  
 Malklare, kien iras mi. Mi do decidas  
 Eltrovi, ĉu la fratoj eble prenis lin  
 El puto, kaj mortigis. Mi esploru ĝin.

SIMEON. JUDAS.

SIMEON.

Sufiĉe karvendite! Restos ĝi kaŝita.

JUDAS.

Se l'patro pri l'afer' ne estos informita.

SIMEON.

Pri tio fidu Levi: ruza estas li!



JUDAS.

Mensogo trompas, sed : ĉu daŭra estas ĝi ?

SIMEON.

Unuanime ni mensogu : oni kredos.

JUDAS.

Ne kredos Dio. La mensogo por Li cedos.

SIMEON.

Sed Dio ne parolos, se silentos ni.

JUDAS.

Sed la konscienco : ĉu silentos ankaŭ ĝi ?

SIMEON.

Ne sangon verŝis ni : riproĉo do pri kio ?

JUDAS.

Ke ni forvendis lian sangon, jen, pri tio !

SIMEON.

Sklaviĝis kiu nin intencis fari sklav'.

JUDAS.

Potenco reva tamen estas sen enhav' !

SIMEON.

Des pli malsaĝe estas, pri potenco rev.

JUDAS.

Stultaĵo estas, kontraŭ revoj brakon levi !

SIMEON.

Ĉu ankaŭ do, ke ni malhelpis pri danĝer' ?

JUDAS.

Danĝer' ! Estonto ĉiam kaŝas sin sur ter' !

SIMEON.

Ni prave do antaŭevitis la danĝeron.

JUDAS.

La tempo kaj spertad' instruos nin la veron.

SIMEON.

Post fakto venas tro malfrue la lernad'.

JUDAS.

Nun tamen jam montriĝas vana la revad'.

SIMEON.

Tion ni dankas nian viglan sagacecon.

JUDAS.

Mi nur bedaŭras la de l'patro afliktecon.

SIMEON.

Nur dum malmultaj tagoj li priploros lin.

JUDAS.

Ne ! Ĉar li amis lin tutkore, ŝajnas min.

SIMEON.

Tio ja klarpruviĝis : jen la kaŭz' de ĉio !

JUDAS.

Li agis kontraŭ ni ; ni agis kontraŭ Dio.

SIMEON.

Ĉu tiom malfeliĉa estos lia sort' ?

JUDAS.

Lin anstataŭu, se ne mankas vin la fort' !

SIMEON.

Junaĝo povas pli facile kutimiĝi.

JUDAS.

En sklavaj ĉenoj li nun devas submetiĝi.

SIMEON.

Ekkonos propran forton : nun obeos li.



JUDAS.

Sed, tiom malproksime de la famili'!

SIMEON.

Malpaciĉiam li inter nia frataro.

JUDAS.

Pli bone ni forvendus Josef al najbaro.

SIMEON.

Distancrilatoj havas pli da konstantec'.

JUDAS.

Ne ĝenis tamen li al nia liberec'.

SIMEON.

Misuzon faris li de l'patra plifavoro.

JUDAS.

Infana voĉo pli influas al la koro.

SIMEON.

Sed granddistance li nun restu karafil'!

JUDAS.

Kiom la vendo kaŭzas jam da maltrankvil'!

SIMEON.

La eta Benjamin karesu nun la patron.

JUDAS.

La vund' en patra kor' ĉiam montros cikatron!

SIMEON.

Anstataŭ Josef li nun havas Benjamin.

JUDAS.

Li vere laŭ vizaĝo multsimilas lin.

SIMEON.

Li malsimilu Josef laŭ la karaktero!

JUDAS.

La infaneto multe perdis per l'afero!

SIMEON.

Al ĝi okazos ja nenia maljustec'.

JUDAS.

Lia sangfrato estis lia sekurec'.

SIMEON.

Li povas fidi je fidela la frataro.

JUDAS.

De l'sama patro, jes, sed diverspatrinaro.

SIMEON.

De kie venas, Judas, tiu veplorad'?

JUDAS.

Ruben! Kial vi ploras, mia kara frat'?  
Nun timas mi prokaŭze: ĉio malkaŝiĝos!

SIMEON.

Li pentas! Nun kolero lia malŝargiĝos!

RUBEN.

Ho fratoj, diru: kie estas la infan'?  
Ĉu vivas ĝi ankoraŭ? Serĉis mi en van'!  
Almenaŭ al mi montru la kadavron ĝian.  
Dolĉigu la rigardo la funebtron mian.  
Donu al mi konsolon tiun. Vidu mi  
Ĝin viva aŭ mortinta! Post la mort' envi'  
Ja ĉesu! Aŭ ĉu eble ĝi ankoraŭ vivas?  
Ĉu eble silentado via do signifas,  
Ke mankas vin por diri tion la kuraĝ'?  
Vi diru: kie estas ĝi?

SIMEON.

En sia kaĝ'!



RUBEN.

Mi ĉie serĉis, sed nenie mi lin trovis.

SIMEON.

Ĉu vi do ankaŭ vin en la afer' enŝovis?

RUBEN.

Ne trovis mi la knabon en la aĉa kav'.

SIMEON.

Ĉu vi eniris ĝin?

RUBEN.

Jen kota la enhav'!

SIMEON.

Do, vere vi klopodis fuŝi la aferon!

RUBEN.

Pri savo mi intencis doni lin esperon.

SIMEON.

Ĉu vi sekrete do intencis savi lin?

RUBEN.

Ho, ĉu li mortis, ĉu li vivas, diru min!

SIMEON.

Vi, perfidulo, tio kostus vian vivon!

RUBEN.

Ĝi kostu kion ajn, vi scias la motivon!

SIMEON.

Sed kiu ajn perfidos, trafos sama sort'!

RUBEN.

Ĝi estu! Sur mi kuŝas priresponda vort'.

SIMEON.

Vi mem pri l'mort' konsentis: kial do ploradi?

RUBEN.

Konsentis mi pri l'puto, por savklopodadi!

SIMEON.

Nun virte vi parolas, frata protektant'!

RUBEN.

Mi petas pri respond' al mia urĝdemand'!

JUDAS.

Estu trankvila, Ruben: Josef viva restas.

RUBEN.

Ĉu vivas li? Al Dio dank'! Kie li estas?

JUDAS.

Sufiĉas, ke li vivas. Ne demandu plu.

RUBEN.

Mi ne trankvilas. Diru la ceteron! Ĉu?

JUDAS.

Al Ismaelido mi lin vendis. Nun vi scias!

RUBEN.

Al Ismaelido vendis! Ĝi ĉielen krias!

Mizeregulo! Kio vin al tiu krim'

Kondukis? Sklavforvendi! Kia hont' sen lim'!

Al tradiciaj malamikoj, sovaĝuloj,

Rabistoj! Ne, eraras mi: civilizuloj

Ja ili estas, ĉar, al ni kompare, nur

Fremdulojn kaptas; ni ungegojn frapis sur

La propra sango, familio, parencano!

Pri tio hontparolos ĉiu samlandano!

En tuta mondo, parolanta kun respekt'

Pri piaj la prapatroj niaj, la efekt'

Kondamno estos, kiam Josef, forirante

De Hebron, sur la sklava vojo rigardante

En la direkto de la patra dom', en kor'

Profunde trafos, kiel glav', animdolor'

Ho Ruben, vi forkuru! Kiu ja sekigos



Okulojn patrajn, kiam oni lin sciigos,  
La aĝkadukan viron, pri l' terura fin'  
De la ĉi tiu dramo? Certe trafos min  
Unuavice la kondamno lia. Kion  
Unue li priploros? Ĉu la mortenvion  
La nian, aŭ ĉu pri de Josef la sklavec'?  
Kiu renkonteniros lin? Ho, la kulpec'  
La via, Judas, estas granda! Mia Dio,  
Kiom da mizerego kaŭzas la envio!

SIMEON.

Ĉu Judas tiom do misfaris, kredas vi?  
Vi mem konsilis pri la puto, kaj nun li  
Pri la vendado. Josef, ambicia ulo,  
Spertadu, se ne hejme, tiam sub fremdulo.

RUBEN.

Ho fil' de Raĥel, frukto de sankta edziĝ',  
Kaŝita en la put', vendita por sklaviĝ'  
En sama tago, de la propraj fratoj viaj!  
Kie kaŝiĝu mi pro hont' post agoj tiaj!

SIMEON.

Vi hontu pro patrino via, adultul',  
Ke semas vi sur patra kampo, vi, fiul',  
Kaj miksas vian frukton kun la patra frukto!

JUDAS.

Mi petas, fratoj, ĉesu tiu interlukto!

SIMEON.

Al vir' honesta venas sur la vango ruĝ'  
Pro lia „sanktedziĝo" el malĉasta buŝ'!

RUBEN.

Ĉu Dan kaj Naftali pri tio ne protestos?

JUDAS.

Restu trankvilaj, fratoj! Tuta land' atestos  
Pri via disputad'. Silentu do, pro Di'.

SIMEON.

Kiu parolas, la respondon aŭdu li!

JUDAS.

Via disputo povus ankaŭ nin perfidi.

RUBEN.

Mi serĉos la Arabojn. Mi klopodos vidi  
La fraton Josef, eble liberigos lin.

SIMEON.

Restu ĉi tie; se ne, mi certigas vin...

RUBEN.

Ĉu estas fratoj vi, aŭ nure frاتمurdantoj?

JUDAS.

Mi petas, fratoj, ne plu estu disputantoj!

RUBEN.

Mi lin promesis veni, por konsoli lin.

JUDAS.

Rigardis viaflanken li, li vokis vin.

RUBEN.

Ho Josef, ĉu vi serĉis Ruben por eskapi?

JUDAS.

Verŝajne, sed la celon li ne povis frapi.

RUBEN.

Li vane fidis do pri mia fidelec'!

JUDAS.

Vi trankviliĝu, frato. Vere, la gravec'  
De la afer' ne estas tiom granda. Vidu:  
Mi mem ne perdis la esperon. Ni nur fidu,  
Ke ĉio bone sin aranĝos. Nun la knab'  
Dum kelka tempo restu en sklavec'. Eskap'.



Aŭ iu ajn bonŝanco povas lin redoni  
 La liberecon. La hazardo povas kroni  
 Eĉ sklavon, kiu tiel multsuperus al  
 Infan' libernaskita: ludo de l'fatal'.  
 Ne scias ni, per kio Josef la prosperon  
 Akiros. Tial ni ne perdu la esperon,  
 Nek trogravigu la aferojn. La mien'  
 De la estont' ŝanĝiĝas. Venas Levi, jen!

LEVI.

Mi buĉis kapron por la veston kolorigi  
 Per varma sango. Volas mi per ĝi ŝajnigi,  
 Kvazaŭ la knabo estis de sovaĝa best'  
 Ŝirita. Tial mi ŝmirados sur la vest'  
 La ruĝan sangon. Poste polvo ĝin makulu.

RUBEN.

La vest' de Josef!

LEVI.

Tiom laŭte ne ululu!

RUBEN.

Permesu, Levi, min, ke ĉirkaŭbraku mi  
 La karan veston. Varman kison mi sur ĝi  
 Anstataŭ sur vizaĝ' de Josef surpremegu.

JUDAS.

Vi donu lin la veston, Levi. Li sategu!

RUBEN.

Plumaro de la kolombet'  
 Kaptita de la akcipitroj,  
 Dum al mi mankis kuraĝet',  
 Kaj embuskiĝis malam-hidroĵ!  
 Donac' de l'patro, ho vestaĵ',  
 Dum tag' kaj nokto ĉirkaŭbrakos  
 Mi vin, dum mia la vizaĝ'  
 Plorados, kaj min punatakos  
 Riproĉoj pro malfidelec'.  
 Kun vi parolos meditante

Mi, kvazaŭ mem en realec'  
 Kun Josef interparolante,  
 Kaj mi sekigos per la lan'  
 Plenlarmajn la okulojn miajn.  
 Ho lan', kovraĵo de l'infan'!  
 Mi eĉ nun aŭdas kriojn ĝiajn!  
 Ŝafid' blekanta, dum en rond'  
 Paŝtist' neniu vin rekonis  
 Laŭŝajne, restis sen respond':  
 Nur eĥo de la put' resonis.  
 Vin, Ruben, trafos pleja pun',  
 Ĉar vi kulpiĝis pro senkulpa  
 Infano, kiu vivas nun  
 En sklavmizero, ĉar la vulpa  
 Pasi' forrabis de grizul'  
 La plejkarulon. Sankta vesto!  
 Kruele mortu mi, kulpul',  
 Mi, senracia, aĉa besto!  
 Ne, patro mia! Estas mi,  
 Kiu disŝiris vian filon.  
 Fabelon do ne kredu vi,  
 Ĉar oni uzas nur trompilon:  
 La propraj filoj estas ja  
 La hundoj, kiuj persekutis  
 La cervon sangavide tra  
 Kampar', kaj senhonte kondukis!  
 Ho simpla tuko, kara vest'!  
 Ho vi, malam', kruela best'!

LEVI.

Redonu vi la veston, por ke mi laŭvole  
 Ĝin kolorigu.

JUDAS.

Nu, redonu senparole.

LEVI.

La sango bonruĝigas. Anstataŭ penik'  
 Servadu mia fingro; tiel la efik'  
 Tre laŭnatura estos. Mi ŝprucigu tie  
 Kaj tie sangon por makuli ĝin, kaj plie



Per man' kaj dentoj ĝin disŝiru mi. Kaj nun  
Ĝin trenu tra la koto; tiun miksu kun  
La sango piedpremante. Preta la pentraĵo!

RUBEN.

Unue frاتمortig', — kia abomenaĵo' —  
Kaj poste trompi patron! Per ĉi tiu verk'  
La senkulpula vest' morttukos sur la ĉerk'  
Kaj la kadavro de la patro, kiu filon  
Priploris ĝis la mort'.

JUDAS.

Ruben, gardu trankvilon!

LEVI.

Se vi silentos, restos for ĉiu suspekt'.

RUBEN.

Vi ĉiel penas, por ke kaŝiĝu l'aspekt'  
De via krim'. Mensogoj ĉiam sin amasas  
Por kaŝi unu la alian. Nur sin lasas  
Mistifi la sencerbaj homoj, infanar',  
Sed ne la vir' prudenta. Iam via far'  
Malsekretiĝos. Ehas puto, heĝoj sonas,  
La nestoj aŭdas, nin la bird' kaj idoj konas,  
La kamp' okulojn havas, same la arbar'.

LEVI.

Tro frue timas vi.

RUBEN.

Ne, tro malfrue, ĉar  
Vi ne facile trompos viron mensosanan.  
Vi spertos tion, kiam oni la infanan  
Kadavron serĉos, kaj esploros pri la mort'  
Kaj ĝiaj cirkonstancoj, aŭdos, ke la vort'  
Ne interakordiĝas, kiam vi atestas.  
Oni facile murdas; malfacile estas,  
La veron kaŝi, zorgi, ke ĉiam atest'  
La via konkordiĝas. Ankaŭ sur la vest'  
La kaprosango sin distingas de sang' homa

Laŭ flar', koloro, gust', aŭ diferenc' ioma.  
Kaj kio, se pruviĝos: ne sovaĝa best'  
Troviĝas tie ĉi?

LEVI.

Nu, preta estas vest'.  
Judas, la monon donu.

RUBEN.

Ho, mi abomenas!

LEVI.

Dudek moneroj. Al ĉiu do apartenas  
El ili du. Jen, prenu.

RUBEN.

Kion vidas mi!

LEVI.

Jen, Ruben, via part'. Ĉu ne akceptas vi?

JUDAS.

Ruben, akceptu!

RUBEN.

Ĉu la manojn mi difektos  
Per mono malbenita?

LEVI.

Kiel sin direktos  
Afero tiu ĉi? Prenu! Vi rajtas ĝin.

RUBEN.

Sangmono! For de mi! Neniam, ĝis la fin'  
De mia vivo ĝin akceptos! Mi rifuzas!

LEVI.

Vin gardu, ke pro skrupuleco vi ne uzas  
Okazon por denunci nin. Kunkulpas vi,  
Do konsekvencojn portu same kiel ni!



RUBEN.

Ja tiu kulpas, kiu vin konsilis vendi.

LEVI.

Vi mem kondamnis lin al put' : kial do plendi ?

RUBEN.

Pro bonintenco.

LEVI.

Kiel ajn, vi kulpas. Nu,  
Akceptu la monerojn kiel ni. Jen, du.

RUBEN.

Tremas la manoj miaj. Kiom ja min tentas  
La mono ! Se akceptas, mi min kulpa sentas  
Pri l'frato.

LEVI.

Frato ! Jes, sed de nur patra flank' !  
Vi ĉiuj premu manon mian, por ke, dank'  
Al via sanktpromes' neniŭ plu parolu  
Pri la okazintaĵo. Ĝin plenumi volu.  
Sed morton indas, kiu de tiu promes'  
Eĉ iom deflankiĝos. Ĉiu diru „jes”,  
Kaj donu sian manon.

JUDAS.

Ruben, sen hezito

Vi jesu !

LEVI.

Donu manon !

RUBEN.

Nu do... jes... kun spito.

LEVI.

Jen, decidite. Nun al fino de l'labor' !  
Al Mambre nun ni senprokraste iru for.

Servisto antaŭiru kun la vest', por diri :  
„En arbitraĵo ni ĝin trovis, kiam iri  
„Al hejmo ni komencis. Ĉu ĝi estas vest'  
„De Josef, aŭ ĉu ne ?” Mi poste pri la rest'  
Zorgados. La grizul', sencerba pro ĉagreno  
Kaj am' al la revul', ĝin kredos. Ĉe alveno  
Nenion scias ni laŭŝajne. Poste ni,  
Aŭdante kaj vidante la veadon pri  
La perd' de Josef, eĉ pli laŭte kunĝemadu.  
Tiel la patron, avon, ĉiujn ni trompadu.  
Sed baldaŭ oni spertos, ke de nun trankvil'  
Regadas hejme pro forest' de l'karafil'.  
Nu, Ruben, do ne timu. Mi vin antaŭiros.  
Nun Josef plejaĝulan rajton ne akiros.  
Vi ĉiuj sekvu min, fidele helpu vi.  
Al Hebron do !

RUBEN.

Vi iru. Baldaŭ sekvos mi.

RUBEN.

Kiom la mensogaĵ' alportos da ĉagreno  
En nian domon familian ĉe l' alveno  
De la sendito, kiam li rakontos pri  
Vestaĵ', en kamp' trovita, kiun dume li  
Al patro montros tutŝirita, makulita  
Per sang' kaj koto. Kiom tiam konsternita  
La patro ja aspektos ! Ho, mi vidas, ke  
La brakojn disetendas li. Kriante : „Ve !”  
Li falas teren paliĝanta kaj senforta,  
Restas kuŝanta senmoviĝe, kvazaŭ morta.  
Alkuras pro la bru' infanoj, servistar',  
Edzinoj, la patrinoj, tuta loĝantar'.  
Kaj Benjamin, aŭdante ĉies la ploradon,  
Priploras ankaŭ nekonscie fratperdadon.  
Jes, ploru vi, infano kompatinda, ĉar  
Li vin lastfoje vokis en suferamar'.  
Plej multe perdas vi. Jen trempaŝante venas  
La blinda avo el la pordo, dum subtenas  
Servisto lin subbrake. Kara rigidul',  
Vi danku la blindecon vian, ĉar okul'



La via ne suferas pro la vid' de l'vesto.  
 Nur palpi povas vi : jen nura la atesto  
 Por via cent kaj sesdeksepa jaro. Se  
 Vi simplanima estus pro aĝeco, ne  
 Suferus tiom vi ĉi tiun grandĉagrenon.  
 Ho fratoj ! Kiel mi senvorte jen la svenon  
 Rigardos de la patro ? Ĉu silentu mi  
 Pri la korsentoj miaj ? Ĉiuj timas ni,  
 Ĉu l'patro rekonscios. Levi manon mian  
 Premas : „Silentu, aŭ vi perdu vivon vian !”  
 Tiel alflustras li. Se mi, kiel edzin'  
 De Lot, nur salkolono estus, certe vin  
 De mia flanko ne minacus la perfido ;  
 Sed nun minace vi al la plej aĝa ido  
 Devigas murdi patron. Min nur restas do  
 Silente murmuradi, kaj timadi pro  
 La stato lia. Tamen, li rekonsciiĝas  
 Kvazaŭ el sonĝ' terura. Larmoj nun ruliĝas  
 Sur liaj vangoj, kaj li pro profundĉagren'  
 Disŝiras siajn vestojn, konvulsie en  
 La haroj siajn fingrojn torde kunpremadas  
 Kiel freneza viro, laŭte plendkriadas :  
 „La vest' de Josef estas ! Lin sovaĝa best'  
 „Formanĝis ! Lia korpo kuŝas en intest'  
 „De ia ajn bestaĉo ! For vi, infanaro !  
 „Edzinoj, lasu min ! Alvoku el arbaro  
 „Ursegon, tigron, por ke ili same min  
 „Disŝiru ! Serĉu mi l'infanon, metu ĝin  
 „En tombon ! Eble trovos mi en arbeto  
 „Piedon, manon. Kuŝas ie ja restaĵo  
 „De lia korpo, kiun enterigu mi  
 „Konsole al funebro mia, ĉar neni'  
 „Al mi nun restas, ol restaĵo sangkovrita !  
 „Mi kisas ĝin, per dentoj tiom disŝirita.  
 „Ho, se li mortus pro la febro, mia kor'  
 „Konsolus sin pro tio, ke dum lasta hor'  
 „Mi povis flegi mian Josef : tio forton  
 „Al mi havigus por transvivi lian morton,  
 „Kaj enterigo certe mankus ne al li.  
 „Mi pensus : frue lin postulis vol' de Di'.  
 „Kaj, se perforta mort' estus la fina sorto

„De l'knabo, lin per homa mano trafu morto,  
 „Prefere ol per besto, ĉar la homa sent'  
 „Ĉiam respekton havas por la homa gent',  
 „Kaj malamiko al venkit' mortinta donas  
 „La tombon, pri kiu nun Josef ne disponas !  
 „Ho katastrofo ! Tia estas do la fin'  
 „De plenmizera jaro, kiam karedzin',  
 „Amata Raĥel, mortis en akuŝa lito ;  
 „Kiam adultis mia unuenaskito ;  
 „Atencis oni al la mia karfilin' ;  
 „La filoj pro kolero kaj pro venĝinklin'  
 „Atakis Hemor, kaj masakris urbon lian,  
 „Kies revenĝ' endanĝerigas genton mian.  
 „Ho centsep jaroj ! Kiom amasigis vi !  
 „Dum la junaĝo en servado vivis mi ;  
 „Turmentis min malamo frata : mi vagadis  
 „Dum multaj jaroj. Sed plej grave nun min batis  
 „La sorto ! Nun vi fosu tombon, infanar' :  
 „Kun Josef mortos mi !” Tiel lia plendar'  
 Senhalte sonas, ĉu la sun' en oriento  
 Aperas, aŭ subiras ĝi en okcidento.  
 Gepatroj la infanojn flegas en dolor' :  
 Etul' sur vesto paŝas, pliaĝul' sur kor' !



## KLARIGAJ NOTOJ.

## UNUA AKTO.

- I p. 5, v. 3.: **flanke de al Dotan la grandvojo.** Tiu granda vojo estis la karavana vojo, kondukanta de Galaad (vidu noton V de la kvara akto) okcidenten al Dotan, kaj de tie suden al Egipto. Oni laŭ tiu vojo transportis la balzamojn, preparitajn en Galaad.
- II p. 5, v. 18.: **praav' Abraham.** Isaak, la avo de Josef, estis filo de Abraham. Jen la genealogia tabelo: Abraham, Isaak, Jakob, Josef. Abraham antaŭe nomiĝis Abram, kio signifas: eminenta patro. Dio tamen al li donis la nomon Abraham, kiu signifas: patro de grandamaso, ĉar Dio al li promesis multnombrian idaron inter kiu troviĝos la Mesio.
- III p. 5, v. 28.: **Per sonĝ' terura.** Tiun sonĝon priskribos Josef poste (vidu p. 6, v. 15 k.s.)
- IV p. 6, v. 21.: **en du fenestroj,** nome la okulkavoj de la serpentoj.
- V p. 6, v. 31.: **spirito de l'patrin'.** La patrino de Josef estis Raĥel (vidu p. 5, v. 1: fil' de Raĥel), kiu mortis unu jaron antaŭe, ĉe la naskiĝo de Benjamin.
- VI p. 7, v. 5.: **malpaco inter fratoj.** La fratoj enviis Josef pro tio, ke la patro Jakob montris al li pli da afableco ol al la aliaj filoj. Tiun envion pliigis la sonĝoj de Josef, pri kiuj poste la fratoj parolos, en la dua akto.
- VII p. 7, v. 10.: **La patro iam same kontraŭ la envi' agis de sia frat'.** Tiu frato nomiĝis Ezaŭ. Jakob kaj Ezaŭ estis ĝemelfiloj de Isaak kaj Rebekka. La malpaco inter la ĝemelfratoj ekestis pro la fakto, ke Jakob, helpata de sia patrino Rebekka, ruze akiris la patran benon, kiun Isaak destinis por Ezaŭ, kaj kiu beno donis multajn privile-

giojn de unuenaskito. Pro tiu malpaco Jakob forkuris al Laban, patro de sia patrino, kaj tie li dum multaj jaroj servis. Fine reirante al la patra domo, Jakob klopodis repacigi sian fraton per donacoj.

- VIII p. 8, v. 3.: **Kaj for de Memfis Josef paŝas.** En Memfis, en Egipto, poste komenciĝis la gloro de Josef. Tamen, li ne iras de la patra domo en Hebron en la direkto de Memfis (suden), sed kontraŭe: norden, al Dotan. Tamen laŭ tiu vojo Dio gvidis Josef al lia gloro.
- IX p. 8, v. 26.: **Por poste regon partopreni:** la regadon de Egipto, en kiu lando Josef fariĝis vicreĝo.
- X p. 8, v. 29 kaj 30. Ĉi tiuj versoj antaŭdiras la rolon de Josef en Egipto, kie li, rikoltigante la abundan grenon dum la prosperaj jaroj, kaj ĝin amasigante en grenejoj, antaŭevitas malsategon dum la sekvantaj sep senpluvaj jaroj.

## DUA AKTO.

- I p. 9, v. 2.: **Ni venis de Siĥem.** Tie la fratoj antaŭe restadis kun la brutaro. Poste ili iris pli norden, al Dotan (norda parto de Samaria). La distanco de Hebron, kie estis ilia hejmo, al Siĥem estas  $\pm$  80 kilometroj.
- II p. 10, v. 9.: **Nur kiu scias, ŝuldas pri la respondec': pro tio estus pli facile, ĉion nei.** Se ni kvaŝaŭas, ke ni nenion scias pri la okazintaĵo, oni ankaŭ de ni ne povas postuli respondecon.
- III p. 11, v. 7.: **Ne klara lia cel'.** Nenio pruviĝas, ke Josef celas ion malbonan kontraŭ ni.
- IV p. 12, v. 13.: **Ke post la Benjamin plej juna estas li.** Benjamin, la sangfrato de Josef (vidu noton V, unua akto) estis la plej juna filo de Jakob. Laŭ la hierarĥio ĉe la Israelidoj, la patraj rajtoj grandparte transiras al la plej aĝa filo (ĉi tie: Ruben.)



Kiel do Josef, preskaŭ la plej juna, povus akiri tiujn rajtojn? Ĉu do Josef estas tiom trompema?

- V p. 12, v. 19.: **Kaj Ezaŭ tro malfrue ploras pro la perdo.** Ĉi tie Simeon aludas la ruzan manieron, laŭ kiu Jakob iam akiris la patran benon, kaj per tio ankaŭ la rajtojn de unuenaskito. (vidu noton VII, unua akto.)
- VI p. 12, v. 22.: **Misuzis iam pri patrina favorec'.** Estis la patrino de Jakob, Rebeka, kiu pliamis lin ol lian ĝemelfraton Ezaŭ, kaj helpis Jakob por akiri la plejaĝulan rajton. Same, ili asertas, nun Josef volas uzi sian pli grandan influon ĉe sia patro.
- VII p. 13, v. 11.: **Se Ruben ne konsentas, planas ni en van',** ĉar Ruben estas la plej aĝa el la fratoj, kaj pro tio lia opinio plejvaloras.
- VIII p. 13, v. 12.: **Streĉate sen akord' la ŝnur' devas rompiĝi.** Same niaj planoj malsukcesos, se ne antaŭe ni akordiĝos, agos laŭ unu sama celo.
- IX p. 14, v. 16.: **Por meti sian piedon sur la nia kol'** = por nin subpremadi.
- X p. 14, v. 28 k.s.: **ke li kun Raĥelid' iom petolu, sin ĝojigu por profit' al sia maljunec'.** Ĉu vi envias al la grizul' (la patro), ke la Raĥel'ido (Josef) per sia ĉeesto, sindonemo kaj amo pligajigu liajn lastajn vivojarojn?
- XI p. 19, v. 14 k.s.: **ĉar mortis patrin', Lea, duonpatrine l'orfon pritraktante, aŭ Bilha tro malame, Zilpa samagante,** k.t.p. La patrino de Josef (Raĥel) mortis. (vidu noton V, unua akto.) Se do ankaŭ Jakob mortos, Josef estos orfo. Lea, fratino de Raĥel, estis ankaŭ edzino de Jakob, do duonpatrino de Josef. Bilha, sklavino de Raĥel kaj patrino de Dan kaj Naftali, eble pro prefero al siaj propraj filoj malamos Josef. Same eble agos Zilpa, la sklavino de Lea kaj patrino de Gad kaj

Asser. Jakob do havis kialojn por timi, ke post lia formorto la sorto de Josef ne estos enviinda.

- XII p. 19, v. 17.: **La Sara'idon sendos laŭ Ismaela voj'.** La poeto ĉi tie nomas Josef: Sara'ido. Sara estis edzino de Abraham kaj patrino de Isaak, kiu estas la patro de Jakob, do la avo de Josef. Pro tio Josef vere estas ankaŭ ido de Sara. Rememorigante pri la nomo Sara, Vondel samtempe rememorigas pri la historio de Ismael. Ismael estis filo de Agar, sklavino de Abraham. Ĉi tiu sendis Agar kun ŝia filo for en la dezerton. Jen do la „Ismaela voj'”. Vondel do diras, ke eble la aliaj edzinoj de Jakob post ties formorto pritraktos Josef'on sammaniere, kiel antaŭe la prapatro Abraham pritraktis Ismael, sendante lin en la dezerton.
- XIII p. 20, v. 2.: **la Siĥem'a murd'.** Por venĝi la atencon al Dina, la filino de Jakob, kiun krimon faris enloĝantoj de Siĥem. Simeon kaj Levi murdis ĉiujn virojn de tiu urbo. Tiu masakro kaŭzis revenĝemon ĉe la Siĥem'anoj, kiuj, eksciant pri la interfrata malpaco, eble uzos tiun bonŝancon por ataki la fratojn, dum kiam ili restadas en la regiono de Siĥem.
- XIV p. 20, v. 8.: **sango de Hemor.** Hemor estis la prapatro de la Siĥemanoj.
- XV p. 20, v. 9.: **El tio kaptis li plimulton de l'trezor'.** Li alproprigis al si la pli grandan parton de la rabajo el Siĥem.
- XVI p. 23, v. 15.: **Ke ĝis Sirio ĝi kaj Mambre sonos for!** Sirio estas la lando norde de Palestino, do ankaŭ norde de Dotan. Mambre estas alia nomo por Hebron, sude de Dotan. Ruben do esprimas ĉi tiun penson: Se vi ne lasos min, mi krios ke malproksime en nordo kaj sudo oni min aŭdos.



- XVII p. 26, v. 7 kaj 8.: **Belesti devas antaŭulo de perfektaĵo sen makulo.** Vondel aludas ĉi tie, ke Josef estas antaŭulo de Kristo. Pro tio li devas esti bela, same kiel la Matenstelo, antaŭiranto de la suno, estas bela stelo.

### TRIA AKTO.

- I p. 38. **Kanto.** La anĝelaro prilaudas la belecon de Josef: lia buŝo estas klara luno, la okuloj estas steloj, la frunto estas suno, la haroj ĉirkaŭas la vizaĝon kiel radioj sin perdantaj en la krepusko. kiu regas en la puto. La brovojn kaj vangojn la poeto komparas kun bruna teksaĵo sub silka vualo de la nebulo, kiu pendas en la puto, kaj tra kiu sparkas la lumo.
- II p. 38. **Respondkanto.** La anĝela horo antaŭdiras la gloron de Josef en Egipto post multe da sufero. Ĉiuj gravaj aferoj okazas nur post peza laboro. Tion la poeto montras per diversaj komparoj.
- III p. 39. **Plukanto.** Ĝi priskribas la feliĉan vivon de la Israelidoj (Jakob = Israel) en Egipto sub la protekto de Josef („ĉe l'alta arb'", v. 3). La „flueg'", (v. 4) estas la Nilo. Oriente de tiu rivero kuŝas la regiono „Geŝan", kien poste transloĝiĝis Jakob kun sia familio („lando de gastam" v. 11).

### KVARA AKTO.

- I p. 42, v. 6.: „**Kiu direktis lin al Dotan pro bonvolo**". Simeon ĉi tie aludas la rakonton de Josef pri anĝelo, kiun li renkontis en Sihem (vidu p. 27, v. 13 k.s.).
- II p. 45, v. 14 k.s. „**Saĝeco Dia kreis membrojn plej utilajn de l'korp' duope**" k.t.p. Judas ĉi tie laŭ orientula maniero, per komparoj, klarigas, ke Dio destinis la fratojn, kiel la ĉefajn korppartojn, por

sin helpi: „se necese nur" ni amputas unu el ili. Poste li pentras la terurajn konsekvencojn de fratmurdo, atentante pri la sorto de Kain, kiu mortigis sian fraton Abel.

- III p. 46, v. 9, 10.: „**Kaj prefere pro kompato nur malpli, ĉar frato Josef estas sen patrino.**" Ni estu indulgemaj je Josef precipe, ĉar li ne plu patrinon havas.
- IV p. 46, v. 12, 13.: „**vi perfortus pri rilat' duobla**", ĉar, murdante Josef, vi ne nur murdas fraton, sed ankaŭ kuzon (ĉar la patrino Lea estis fratino de Raĥel). (vidu noton XI de la dua akto.)
- V p. 48, v. 5, 6.: „**Portiĝas per la ŝarĝobestoj la balzam' rekte de Galaad, ankaŭ mirho kaj cinam'**". La regiono Galaad, aŭ Gilead, situas oriente de la Jordano, inter la flankriveroj Jarmuk kaj Arnon. Ĝi produktas multe da aromaj plantoj, el kiuj oni preparis balzamon.
- VI p. 52, v. 12, 13 k.s.: **kian mizeron portis Ismael, kiam...** Ismael, filo de Agar, la sklavino de Abraham, kiu forpelis ambaŭ el sia domo en la dezerton Pharan (Faran). Vidu noton XII de la dua akto. Ismael poste edziĝis kun Egiptanino, kaj fariĝis prapatro de granda gento: la Ismaelidoj aŭ Araboj (vidu p. 53, v. 2: „**pri granda, glora la estont'**" )
- VII p. 53, v. 23, 24.: **Ja rampas ĝi, kie ne iri povas.** Jen Nederlanda proverbo: la sango rampas, kie ĝi ne povas iri. Ĝi signifas: ĉiam la parenceco sin sentigas, eĉ dum cirkonstancoj, kiuj tute fremdigus parencojn.
- VIII p. 54: **Kanto.** La poeto ĉi tie aludas la lertecon de la Araboj pri arkpafado: Via fanfaronado, Araboj, pri via feliĉo similas al la krakado de via pafarko, do, havas nenian veran signifon.



- IX p. 54, v. 7, 8.: **Kie vivadas la Feniks', glorata en festona miks'.** La Feniks estas birdo kiu, laŭ Orienta fabelo, post 500-jara vivado konstruas neston el aromaj branĉetoj. La sunaj radioj forbruligas la neston kune kun la Feniks. La sekvantaj versoj enhavas la vortojn, kiujn enhavas la festonoj, per kiuj la Araboj laŭdas sian Feniks.
- X p. 54, v. 13, 14.: **Dissendis filojn de Agar kaj Ketura.** Pri „Agar” vidu noton VI de ĉi tiu akto. Ketura estis la edzino de Abraham post la morto de lia unua edzino Sara.
- XI p. 54, v. 16, 17, 18.: **Je spito de la ambici' de Isak'idoj, je ĉagren' de la Hebreoj.** La Ismaelidoj sin konsideris kontraŭuloj de la Ismaelidoj, malgraŭ la sama deveno el Abraham.
- XII p. 54. Respondkanto. Ĉi tie la Anĝeloj prikantast **sian Feniks**, la veran. Ili prikantast ĝian belecon, kaj aludas la el ĝi naskiĝontan Feniks, kiu estas Kristo.
- XIII p. 55, v. 25.: **Al sunurb' Memfis.** Vidu noton VIII de la unua akto. „Sunurbo” estas la traduko de la greka nomo de tiu urbo: Heliopolis. En Memfis Josef poste fariĝis vicreĝo.
- XIV p. 55, v. 25, 26.: **tra nuboj da sablo, polvo.** La vojo de Josef kun la karavano kondukis tra la dezerto Sinai al Egipto.
- XV p. 55, v. 27, 28.: **La urbo, kies obelisk' celas al la ĉiela disk'.** La obeliskoj en la Egiptaj urboj ne nur estis ornamaĵoj, monumentoj, sed ankaŭ servis kiel sunhorloĝoj, indikante la pozicion de la suno. Ili do alcelis la ĉielan diskon, la sunon.
- XVI p. 55, v. 31.: **Klinas kronon el sepbranĉar'.** La ĉefa parto de la Nil-ebenaĵo (ĝia krono) estas la Nil-delta, tra kiu la Nilo per sep branĉoj fluas al la maro.

- XVII p. 55, v. 32, 33.: **kies la saĝa far' superas al saĝula bril'.** La Faraono de Egipto vane konsiliĝis ĉe la egiptaj saĝuloj, kiuj ne povis doni klarigon de liaj sonoj. Josef tamen ilin klarigis, kaj tiel protektis la Egiptan popolon kontraŭ granda mizero (vidu noton X de la unua akto).
- XVIII p. 55, v. 35.: **Filparo.** Josef havis du filojn: Manasse kaj Efraim. La kadavron de Josef ili en Egipto enbalzamigis kaj metis en sarkofagon, el kiu poste Moiso ĝin prenis kaj kunportis al Kanaan. Pro tio: **idaro (zorgados) por la enterig' (v. 36).**
- XIX p. 55, v. 37.: **tra river' kaj mar'.** La transporto de la korpo de Josef al Siĥem okazis tra la Ruĝa Maro kaj la rivero Jordano.
- XX p. 55, v. 38, 40: **Al tombo lia en Siĥem, donac' de l'patro, pro laŭdem.** Josef sur sia mortlito ordonis, ke oni ĉe la reiro de la Israelidoj al Kanaan kunportu lian kadavron, por tie ĝin enterigi. Oni lin pro tio enterigis en Siĥem, la regiono, kiun Jakob, krom la filan heredaĵon, donacis al Josef, por tiel montri sian laŭdon al sia amata filo (**pro laŭdem'**).

## KVINA AKTO.

- I p. 57, v. 21, 22.: **aŭ ĉu Ĥam- aŭ Amor'ido lin mortigis.** Ĥam estis filo de Noaĥ, kies filon, Kanaan, trafis la malbeno de Noaĥ. Ĥam'idoj pro tio signifas ĉi tie: Kanaan'idoj, loĝantoj de la ebena parto de Palestino. Amor'idoj: verŝajne la loĝantoj de la montaraj regionoj de Palestino.
- II p. 63, v. 12: **Al tradiciaj malamikoj.** Vidu noton XI de la kvara akto.
- III p. 67, v. 14, 15.: **ĉar la vulpa pasi' forrabis de grizul' la plejkarulon.** La vulpo, rabbesto, konata ankaŭ pro sia ruzeco: oni ne nur montris la pa-



sion de rabbesto, sed ankaŭ uzis ruzecon por trompi la patron.

- IV p. 68, v. 15 k.s. : **Ehas puto, heĝoj sonas, la nestoj aŭdas, nin la bird' kaj idoj konas, la kamp' okulojn havas, same la arbar' :** Tre trafe la poeto dirigas Ruben, ke ĉio kapablas malkaŝi la krimon.
- V p. 70, v. 16. : **Al Mambre.** Vidu noton XVI de la dua akto.
- VI p. 71, v. 33. : **Jen trempaŝante venas la blinda avo :** Isaak, kies blindecon jam misuzis Rebeka (vidu noton VI de la dua akto) por trompe akiri la benon al la unuenaskito por Jakob.
- VII p. 72, v. 11, 12 : **Se mi, kiel edzin' de Lot, nur salkolono estus.** Lot estis frato de Abraham. Forkurante kun sia familio, kiam Dio pundetruis la urbojn Sodomon kaj Gomoron, li ricevis la Dian ordonon, ke oni ne returnen rigardu dum sia fuĝado. La edzino de Lot malobeis kaj sammomente mortis, fariĝante salkolono.
- VIII p. 72, v. 28, 29. : **metu ĝin en tombon.** Ĉi tiu kaj la sekvantaj plendoj de Jakob akcentas la bedaŭron, ke nun Josef post sia morto ne kuŝas en tombo. Komparu sampaĝe : v. 31 : **kiun enterigu mi konsule al funebro mia ;** v. 39 : **Kaj enterigo certe mankus ne al li ;** kaj sur paĝo 73 : v. 4, 5 : **Kaj malamiko al venkit' mortinta donas la tombon, pri kiu nun Josef ne disponas.** Nur la kadavrojn de lepruloj kaj krimuloj oni metis en la dezerto kiel kaptaĵon por la sovaĝaj bestoj. Entombigo do estis honorigo al la mortinto. Tio pli bone komprenigas la profundan doloron de Jakob ankaŭ pro la maniero, laŭ kiu Josef mortis.





Esperanto Presejo  
SNEP & VAN PIERE A.S.  
Kruisstraat 12, Tel. 3743

Książnica Podlaska  
im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku



000678421